

# ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Lins pri kluboj en  
Orienta Eŭropo**

**Forumo  
"Etnoj kaj Naturo"**

**Michael Jackson  
kaj Esperanto**

**Tarschys:**

**"Ni tre atentigas**

**pri lingvaj demandoj"**

# Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: Por freŝa kuraĝo (John Wells)
- 2 "Ni riskas formiĝon de nova klas-socio" (intervjuo kun Daniel Tarschys, Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo)
- 4 Eksteraj rilatoj: Lingvopolitiko por internacia organizo (Oszkár Princz)
- 5 Eŭropo: Espero, Fenikso, Bude Borjan (Ulrich Lins); Bulgario: Kriza periodo; Pollando: PEA renoviĝas (Andrzej Petty); Slovakio: Etnoj kaj naturo (Lev Medvedev); La Chaux-de-Fonds komunikas (Mireille Grosjean, Giorgio Silfer)
- 8 Afriko: Sindediĉo kaj senlaboro (Atilio Orellana Rojas); Ne lasu vin trompi (Hans Bakker)
- 9 Azio: Turismo = ŝanco utili (Trude Sinno)
- 10 Kongresa komunikado 2 de la 80-a Universala Kongreso en Tampere
- 11 Fondaĵoj kaj kontoj: Grabowski: Rento por talentoj (Aldo de' Giorgi)
- 12 Fakaj asocioj: Kunligilo de landoj kaj popoloj (István Gulyás)
- 13 Michael Jackson kaj Esperanto  
Junularo: Seminario: Kio estas regiono? (Nora Csiszár)
- 14 Recenzoj: *Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj*; *Versoj* de Rudaki (Sabira Ståhlberg); *Kaj ni solas* (Mark Fettes)
- 15 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 16 Foliume (pripresaj raportetoj)
- 17 Reagoj: Prononc-indikoj: jes, sed kiaj? (Wouter F. Pilger); Ne ĥimeran hibridon (YAMASAKI Seikō); Nur unu el 16 inferoj (Nisi Yasuhiro)
- 18 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 20 Nekrologoj; Oficiala informilo

## Vi trovos

intervjuon kun prestiĝa politikisto (p. 2-4), kiu iam lernis Esperanton. Oni povas bedaŭri ke Daniel Tarschys, kiu pro siaj origino kaj plurlingveco bone komprenas la lingvan problemaron, ne restis aktiva esperantisto. Sed pli gravas la demando: ĉu la organizo de 33 eŭropaj landoj kiun li mastrumas, praktikas taŭgan lingvopolitikon? Ĉu ni, esperantistoj, povas helpi por ties plibonigo?

Vi ankaŭ trovos — ekde nun — iom novaspektan revuon en laleterkesto. Jen, via 88-jara konato *Esperanto* ne ĉesas surprizi: ĝia vestoŝanĝo iomete mirigas eĉ la redaktoron, kiu havigis la novan kostumon kun la fasonista helpo de Francjo Veuthey. Sub la pli ŝika ekstero nia veterano espereble kaŝas la samajn junecajn virtojn kiel ĝis nun — al kiuj en 1995 aldoniĝu akurateco. La oldulo intencas viziti vin kiel eble plej frue en ĉiu monato!

Restigu respektindan ritmon: rapidajn reagojn ricevu Roter dama redaktoro — raportojn, rakontojn, recenzojn, referojn, resumojn, rebatojn . . . rubrik-remburajojn!

*La kovrilo:* Daniel Tarschys. (Foto: Konsilio de Eŭropo)

## ESPERANTO

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto).

**Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

**Redaktoro:** István Ertl.

**Abonprezo:** varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

**Anoncarifoj** (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Adreso de la Centra Oficejo de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Telefona:** (010) 436 10 44; 436 15 39.

**Telefaksa:** (010) 436 17 51.

**Telegramoj:** ESPERANTO ROTTERDAM.

**Banko:** Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

**Kreditkartoj:** 

**Ĝenerala Direktoro:** Simo Milojević.

**Direktoro de la CO:** Osmo Buller.

### Estraro de UEA

**Prezidanto** (kunordigado, reprezentado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. +44/(0)81/542-03-02; fakso 715-40-10.

**Vicprezidanto** (landa kaj regiona agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; tel. +49/(0)221/680-32-50.

**Ĝenerala Sekretario** (informado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T. Fettes, 158 A Henderson Avenue, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7P6; tel. +1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

**Estrarano** (financo): s-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/(0)20/642-18-53.

**Estrarano** (azia agado): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul — 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

**Estrarano** (kulturo, kongresoj): s-ino Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

**Observanto** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija Beloŝević, Sveti duh 130, Crnomorec, HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/(0)41/576-092; fakso 428-847.

**Observanto** (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G, NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel. kaj fakso +31/(0)71/148-801.

# Por freŝa kuraĝo

Mi deziras sukcesan kaj prosperan novan jaron al ĉiuj niaj membroj! Ĉi tiu estas la sesa fojo, je kiu mi tiumaniere salutas vin kiel Prezidanto: kaj ĝi devas esti la lasta, ĉar en julio, post kompletigo de miaj du trijaraj oficperiodoj, laŭstatute vi ne rajtos plu reelekti min. Venis do la momento por rigardi malantaŭen kaj antaŭen.

Antaŭ ses jaroj, kiam mi transprenis la prezidadon de nia Asocio, ankoraŭ staris la Berlina Muro kaj ankoraŭ ekzistis Sovetunio kaj unueca Jugoslavio. Kiaj konvulsioj de post tiam trafis la landojn de Orienta Eŭropo kaj kun ili ankaŭ nian tiean movadon! Oni devis lerni novajn manierojn por vivi, novajn manierojn por organizi. Sed ni ja lernis kaj lernas. Ekzemple en Pollando la landa asocio ĵus renovigis sin en nova formo por la novaj cirkonstancoj. En Rusio salutinde malaperis la skismo inter la du landaj asocioj: REA kaj REU unuiĝis sub la nomo Rusia Esperantista Unio.

Tiuj eventoj ne restis senĉaj en Okcidenta Eŭropo. Aparte bonvena estis la decido de la nederlandaj esperantistoj, forbalai la malnovan dividon inter la "socialista" kaj la "neŭtrala" (aŭ "burĝa") movado, tiel kreante unuecan landan asocion, Esperanto Nederland.

Ĉiu iom sperta esperantisto scias, ke ne sufiĉas unu-du jaroj por ke ni gajnu la tutan mondon por Esperanto. La vojo estos longa. Ni devos labori por nia lingvo ankoraŭ dum multaj jaroj kaj jardekoj. Fervoraj movadanoj foje seniluziiĝis, ĉar ne ĉiu nia klopodo tuj portas fruktojn. Foje ni estis tro ambiciaj: foje ni devis rezigni pri klopodoj, kiuj montriĝis esti preter nia kapablo.

Tamen tio ne signifas, ke ni devas rezigni pri la agado por Esperanto. Ĝi restas unu el la belaj kaj noblaj idealoj de la homaro. Same kiel ni strebu por monda paco (sed diversloke la homoj ankoraŭ militas), same kiel ni strebu por homa interfratiĝo (sed diversloke la homoj restas dividitaj per malamo), tiel same ni strebu por interkompreniĝo per komuna lingvo (kvankam ĝis nun restas la lingvaj baroj inter la homoj).

\* \* \*

Inter la apartaj problemoj de 1994 estis la suferoj de la esperantistoj en Bosnio, Angolo kaj Ruando, pro la tieaj militoj. Per nia Konto Espero ni faras, kion ni povas, sed ni povas malmulton. Ekonomia krizo ja daŭras en pluraj orient-eŭropaj landoj, en Kubo, kaj aliloke.

Sed la jaro alportis ankaŭ plurajn gravajn sukcesojn.

- La 79-a Universala Kongreso en Seulo estis granda sukceso: ne nur el organiza kaj financa vidpunkto, sed ĉefe pro la neeŭropeco de la partoprenantoj. Ili pruvis ke ofte ili estas pli vervaj adeptoj de Esperanto ol la laciĝintaj (?) kaj konsumobseditaj okcidentanoj.
- En Afriko ni notas rimarkindajn atingojn en la formo de la kongreso de Tanzania E-Asocio kaj la prearoj por la Tria Afrika Kongreso de Esperanto.
- La mondkonata itala verkisto Umberto Eco, per sia libro *La ricerca della lingua perfetta* ("La serĉado de perfekta lingvo"), pledas nerekte sed persiste por nia afero. Tio valoras multoble pli ol niaj rektaj pledoj.

- Grava evento estas ankaŭ la apero de *Le défi des langues* ("La defio de la lingvoj") de Claude Piron kaj *La lingua fantastica* (itala antologio de E-sciencfikciaĵoj), ambaŭ ĉe nemovadaj eldonejoj.
- Nobel-premio por ekonomiko estis aljuĝita al nia dumviva membro Reinhard Selten. En intervjuoj li ofte, spontane kaj nature, mencias sian esperantistecon.
- Post la problemoj trafintaj plurajn eŭropajn E-centrojn, kreiĝis novaj, espereble sukcesontaj, centroj en Kolombio kaj en Japanio.
- Ne malplej grave: interne de UEA, ni sukcesis fine akuratiĝi la aperitmon de la periodaĵoj kaj stabiligi la financon de la Asocio.

Tiuj sukcesoj eble ne estas spektaklaj. Sed spektaklaj sukcesoj okazas nur en vetludejoj kaj borsoj, kaj tiaj sukcesoj povas malaperi same spektakle kiel ili venis. Tamen, niaj propraj atingoj, eĉ se ili ne estas epokfaraj, kapablas nutri iom da freŝa kuraĝo. Ni ne timu preni tiun kuraĝon por daŭrigi nian agadon kaj batalon. Ni konsciu, ke ni laboras por pli justa mondo, por egalrajteco kaj digno sur la kampo de la interhoma komunikado. Ni ne malesperu pro la foro de nia celo, ĉar ĝi ne estas, bedaŭrinde, pli proksima ankaŭ sur la aliaj kampoj de la homa aktivado. Ne eblas sukcesi pri Esperanto antaŭ ol sukcesi pri la monda paco, antaŭ ol venki la malsaton kaj elimini gravajn malsanojn. Sed eblas labori por tiuj celoj. Belan okazon donas al ni tiurilate la 50-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj en 1995. Ni festos ĝin i.a. per modela asembleo en la kadro de la 80-a Universala Kongreso en Tampere. Ni do laboru fidele kaj konstante por nia idealo. Kiu scias, kiaj novaj sukcesoj atendas nin? Ni havu kuraĝon pensi, ke kelkajn el ili portos al ni ankaŭ la jaro 1995.

John Wells



*Mi ĵus aŭdis vin paroli la svedan kun iu.*

Jes, kun sveda sekretariino.

*Fakte, kiom da lingvoj vi konas, parolas?*

Mia gepatra lingvo estas la sveda. Svedoj facile komprenas la norvegan kaj la danan. La angla estas la fremda lingvo kiun mi plej bone parolas, sed en Strasburgo mi devas multe uzi ankaŭ la francan, la alian oficialan lingvon de Konsilio de Eŭropo. Krome, mi konas la germanan kaj la rusan.

*Kiel vi rilatas al Esperanto? Vi ja lernis ĝin infanaĝe.*

Jam frue mi tre interesiĝis pri lingvoj, ankaŭ pri lingvoj iom ekzotaj, por tiel diri. Esperanton mi lernis post la angla, je la aĝo de 12-13 jaroj, kaj dum kelka tempo mi vaste korespondis en Esperanto kun gejunuloj en pluraj landoj. En 1956 mi partoprenis Universalan Kongreson en Kopenhago, kaj mi facile komprenis la parolatan lingvon.

*En 1987 vi alparolis Esperante la jubilean kongreson de svedaj esperantistoj.*

La tiama prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson, kiu estas mem esperantisto ...

*... kaj Honora Patrono de UEA ...*

... estus devinta fari paroladon al la esperantistoj en la parlamentejo. Sed li malsaniĝis, kaj oni trovis min kiel solan anstataŭanton. Mi ricevis la manuskripton kaj senprobleme laŭtleĝis ĝin. Post 30 jaroj mi ankoraŭ bone komprenis la lingvon. Mi kredas ke mi ne plu kapablus aktive uzi Esperanton, sed mi povus legi ĝin.

*Ĉu Esperanto donis al vi ion specialan?*

Jes, nepre. Ĝi estas tre facila lingvo. La fakto ke mi lernis ĝin dum kelka tempo, donis al mi specon de lingva praktiko, adaptiĝa kapablo, de fido je gramatiko, kaj ĉio tio multe helpis min por studi aliajn lingvojn.

*Ĉu vi do konsilas la lernadon de Esperanto, pro ĝia lernfaciliga kapablo?*

Certe. Koni unu lingvon nepre faciligas la lernadon de alia. La unua fremda lingvo ankaŭ donas novan perspektivon, pli bonan komprenon pri la propra lingvo.

*Kion vi dirus, se vi devus alparoli similan kongreson okaze de la 200-a datreveno de la lingvo?*

Mi ne kredas je la eterna vivo!

*Do, je la 150-a. Se vi estus malsana, iu povus laŭtleĝi la paroladon!*

Mi devas konfesi: pro tio ke la lingvo dum siaj unuaj cent jaroj ne fariĝis rekonata, ĝenerale uzata, ne ŝajnas al mi realisme esperi ke ĝi povus anstataŭi ĉiujn lingvojn en la internaciaj kontaktoj. Tamen, kiel internacia komunikilo, komprenigilo, Esperanto havas gravajn rolon kaj funkcion, des pli ke ĝi estas facile lernebla kaj uzebla. La Esperanto-movado povas fieri pri bonaj rezultoj.

*Mi devas precizigi ke la esperantistoj plejparte ne plu celas ĝeneraligi la uzadon de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj; ili proponas ĝin kiel avantaĝan komunikilon, kiu interalie forigas lingvan diskriminacion kaj ĝenerale faciligas la lernadon de lingvoj.*

Mi ne dubas ke ĝi estas tre utila komunikilo por tiuj kiuj lernas ĝin.

*Probable vi, kiu konas tiel bone plurajn lingvojn, malpli sentas psikan malkomforton kiam vi uzas ilin.*

Ne: kiel denaska parolanto de malgranda lingvo, mi mem spertas tiun malkomforton. Mi estas tre sentema al la lingvaj problemoj kiuj aperas en la eŭropaj konstruado kaj kunlaboro. Ekzistas ne subtaksenda diferenco inter la

# "Ni riskas de nova ki

homoj kiuj povas uzi sian gepatran lingvon por internacie komuniki, kaj tiuj kiuj devas lerni fremdajn lingvojn por la sama celo. Ni riskas en Eŭropo formiĝon de nova klas-socio, kun civitanoj unuaklasaj kaj duaklasaj, laŭ la lingvosocio. La diverseco de lingvoj estas unuflanke riĉaĵo, sed ĝi kreas aliflanke problemojn. Vi certe konas la buĝeton de Eŭropa Unio pri lingvaj servoj. Ni elspezas malpli ...

*... ĉar vi laboras nur kun du oficialaj lingvoj: la angla kaj la franca.*

Krome, la germana kaj la itala estas laborlingvoj en la Parlamenta Asembleo. Ankaŭ multaj konferencoj organizataj de Eŭropo uzas pli da lingvoj ol nur la du oficialajn.

*Ĉu ne leviĝas voĉoj por la uzo de pli da lingvoj sur pli da terenoj?*

**L**a nova Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo lernis Esperanton en sia infanaĝo. Kion pensas la iama esperantisto pri la lingvaj problemoj en Eŭropo? Kiel traktas ĉi tiujn problemojn la organizo ĉe kies pinto li laboras? Ni havis okazon starigi tiujn demandojn al Daniel Tarschys — franclingve — la 17-an de novembro, en la Strasburga sidejo de la Konsilio.



# formiĝon as-socio"

Kompreneble jes! La reprezentanto de Germanio ofte memorigas pri la graveco de la germana lingvo. Rusio baldaŭ povos fariĝi nia membroŝtato. Tiam, tre probable, ni devos alpreni la rusan, almenaŭ kiel laborlingvon...

*... kio plu kreskigos la kostojn ...*

Nepre, kaj komplikos la laboron! Nia personaro kutimiĝis al dulingva funkciado angla-franca.

*Oni kutimas diri ke tio estas la prezo pagenda por demokrateco. Sed la esperantistoj opinias ke ili havas alian rimedon. Kia rimedo povus helpi, laŭ vi, kontraŭ la Babela plurlingveco, kiu ja estas riĉaĵo — kiel vi diris —, sed aliflanke terure obstaklas la ĉiutagan laboron?*

Kompreneble, ni faras multon por faciligi la lernadon de lingvoj. Ni havas sciencajn centron en Graz (Aŭstrio), kiu okupiĝas pri lingvoinstruado kaj ties metodologio.

Ni ellaboris specialan agadplanon por plibonigi la lingvajn konojn en kelkaj landoj kun interreta streĉiteco: en la baltaj landoj troviĝas rusa loĝantaro kiu antaŭe kutimis paroli sian propran lingvon — la lingvon de imperio —, sed nun trovas sin en lando kun malsama nacia lingvo, kiun ĝi devas lerni. Ekzistas la Eŭropa Ĉarto de Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj, kiun subskribis, mi kredas, dek tri landoj, sed ĝis nun nur Norvegio kaj Finnlando ratifikis ĝin. Por ĝia ekvalido necesas tamen minimume kvin ratifikoj; do ni atendas ke pli da membroŝtatoj ĝin malkovru.

Vi vidas ke ni ĉi tie tre atentis la lingvajn demandojn.

*Ĉu vi ne kredas ke minacas danĝero de ĝenerala anglalingviĝo en la mondo?*

Ekzistas timo pri tio en pluraj landoj. Sufiĉas aludi la ĵusan leĝon Toubon en Francio, kiu celas protekti la francan lingvon. Sed certaj lingvoj, ekzemple la islanda, tute ne pruntas el la angla. Lastatempe, kiam mi transiris iun ŝtatlimon, mi vidis pasporton sur kiu staris la ne internacia, sed propre islanda vorto *vegabréf*, “vojletero”.

*Same “vojletero” en la hungara, útlevél. Sed, por formuli pli precize: ĉu ne estas tiel ke ĉiu eduk-politiko kiu celas plibonigi la lernadon de lingvoj, finfine riskas plibonigi la lernadon nur de la angla? La homoj logike elektas la lingvon kiu proponas plej larĝan eblaron.*

Ne, mi ne kredas tion. La ĝeneraliĝanta lernado de la angla estas bona afero. Sed en la eŭropa labormerkato



## Daniel Tarschys

### Ĝenerala Sekretario de Konsilio de Eŭropo

Daniel Tarschys naskiĝis la 21-an de julio 1943 en Stokholmo (Svedio). Li estas edzo kun du filinoj.

Li diplomiĝis pri juro ĉe la Universitato de Stokholmo (1965), magistriĝis (1967) kaj doktoriĝis (1972) pri politiko

kaj sovetoologio en Princeton (Usono). Doktoriĝinte pri politikaj sciencoj ankaŭ en Stokholmo (1972), li instruis ĉe ties universitato kiel docento inter 1972 kaj 1976. Li profesoris pri Sovetio kaj Orienta Eŭropo en Uppsala (1983-85), resp. pri politikaj sciencoj kaj ŝtata-administro en Stokholmo (ekde 1985).

Post lokaj funkcioj en Lidingö apud Stokholmo (1968-76), Tarschys elektiĝis parlamentano (1976-82, 1985). Li laboris dume kiel konsilisto en la financa ministerio (1976-78, 1979-83) kaj kiel ŝtatssekretario ĉe la buroo de la ĉefministro (1978-79). En la parlamento li prezidis la socialan komisionon (1985-91), poste tiun pri eksteraj aferoj. Ekde 1992 li vicprezidas Internacion Liberalan.

Membro de la Parlamenta Asembleo de Konsilio de Eŭropo (1981-83, kaj de post 1986), li funkciis kiel ĝenerala sekretario de la liberala grupo en 1987-91, kaj iĝis ties prezidanto en 1991.

Liaj funkcioj inkluzivas konsilianecon en la Sveda Agentejo por Kunlaboro kun Evolu-landoj en Esplorado (SAREC, ekde 1991) kaj en la Stokholma Instituto pri Pac-esploroj (SIPRI, de 1992). Li publikigis multajn librojn kaj artikolojn pri politika filozofio, buĝeta politiko, ŝtadministro kaj kompara politiko. ★

Foto: Konsilio de Eŭropo

same necesaj lingvoj estas la franca, germana, hispana, kaj en Orienta Eŭropo la rusa. Ĉi tiujn oni lernas kiel duan aŭ trian fremdan lingvon. Mi ne kredas ke la angla venkos.

**Kiel vi komentus la frazon de Nobel-premiito pri ekonomiko, la germana esperantisto Reinhard Selten: "La internacieco de la angla estas pli bona ol nenia internacieco"?**

Estas konate ke en pluraj sciencobranĉoj la angla funkcias kiel peranta lingvo. En ekonomiko, certe! Tamen, tio ne validas por ĉiu scienco. Dume ni devas subteni ke ĉiu povu esprimi sin en sia gepatra lingvo.

**UEA estas en konsultaj rilatoj kun Konsilio de Eŭropo. Mi pensas ke vi povus profiti el la spertoj de la esperantistoj, precipe rilate propedeŭtikon.**

Nia fako pri kulturo pretas kunlabori kun vi.

## Kio estas Konsilio de Eŭropo?

Fondita en 1949 de 10 ŝtatoj, Konsilio de Eŭropo estas la plej malnova kaj plej ampleksa politika organizo de la kontinento: hodiaŭ ĝi nombras 33 ŝtatojn-membrojn. Naŭ orient-eŭropaj ŝtatoj aliĝis al la Konsilio en la lastaj jaroj: Hungario (1990), Pollando (1991), Bulgario (1992), Ĉeĥio, Estonio, Litovio, Rumanio, Slovakio kaj Slovenio (1993). Pluaj landoj kandidatas por aliĝo, i.a. Rusio kaj Ukrainio.

Ĉi tiu organizo, kun sidejo en Strasburgo, distingendas disde la Eŭropa Unio, kies ĉiuj 12 membroj tamen apartenas ankaŭ al la Konsilio. Ĝi cetere ludonas sian Strasburgan parlamentojn por kunsidoj de Eŭropa Parlamento.

Konsilio de Eŭropo celas: defendi la homajn rajtojn kaj la parlamentan demokration; normigi la socialan kaj juran praktikon de siaj membroŝtatoj per kontinent-skalaj interkonsentoj (ekzistas pli ol 150 tiaj); instigi la konsciigon pri eŭropa identeco baze de komunaj valoroj kaj trans kulturaj diferencoj. En 1989 aldoniĝis la celo antaŭenigi ĉi tiujn valorojn en la postkomunismaj landoj de Eŭropo kaj helpi ties necesajn reformojn.

La decid-organo de la Konsilio estas komitato konsistanta el la ministroj pri eksterlandaj aferoj de ĉiu membroŝtato. Al la interkonsiliĝa organo, la Parlamenta Asembleo, la landaj parlamentoj delegas 236 membrojn kaj ties 236 substituitojn. Ekde 1994 funkcias, kiel konsulta organo, Kongreso de Lokaj kaj Regionaj Povo, kun 468 membroj.

Ĉe la Ĝenerala Sekretariejo, kiun gvidas Daniel Tarschys, laboras 1200 funkciuloj. La du oficialaj lingvoj de la Konsilio estas la angla kaj la franca.

Inter la konvencioj ellaboritaj de la Konsilio plej elstaras la Eŭropa Sociala Ĉarto (1961) kaj la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj (1950). Ĉi lasta ebligas ke individuoj kaj ŝtatoj prezentu plendojn kontraŭ ŝtatoj: Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj verdiktas pri tiuj senapelacie.

En Esperanto la nomformo "Konsilio de Eŭropo", proponata ankaŭ de *Deklingva manlibro pri politiko* (ed. Stefan Maul, 1994), ŝajnas preferinda al "Eŭropa Konsilio". Ĉi tiu erariĝe similas al "Eŭropa Konsilantaro", regula renkontiĝo de la ŝtatestroj aŭ ĉefministroj de Eŭropa Unio.

**Daniel  
Tarschys  
en la  
Parlamenta  
Asembleo de  
Konsilio de  
Eŭropo**



Foto: Konsilio de Eŭropo

**Kiu estas via plej granda deziro kies plenumiĝon vi volus vidi en via kvinjara mandato, ĵus komencita?**

Konsilio de Eŭropo, institucio por la homaj rajtoj, por la demokratio parlamenta kaj plurisma, kaj por la jurŝtato, havas nun historian okazon por antaŭenigi ĉi tiujn valorojn en Orienta kaj Centra Eŭropo. La ĉefa tasko de la 90-aj jaroj estas efike disvastigi ilin en novaj teritorioj.

**Sed kion pri la risko akcepti la membriĝon de ŝtatoj kiuj ne povas aŭ ne volas respekti ĉiujn homajn rajtojn?**

Oni kompare mezuru la riskon de allaso kaj de eksterlaso. Laŭ mi pli valoras integri tiujn landojn en la eŭropajn strukturojn, por ke multobliĝu iliaj kontaktoj kun la aliaj demokratiaj ŝtatoj de Eŭropo: jen maniero firmigi kaj stabiligi iliajn jamajn atingojn.

*Je la fino de la intervjuo, ni transdonis numerojn de la revuo Esperanto, la verkon Le défi des langues de Claude Piron, kaj Jarlibron 1994 de UEA. Ekvidante ĉi tiun lastan eldonaĵon, Tarschys rimarkigis ke li ankoraŭ gardas en sia biblioteko la Jarlibron de 1956.*

### EKSTERAJ RILATOJ

## Lingvopolitiko por internacia organizo

La 6-an de decembro finiĝis en Budapeŝto pintrenkontiĝo de ŝtatestroj kaj registarestroj de la 52 landoj de Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (KSKE).

Por reprezentantoj de neregistaraj organizoj oni aranĝis inform-kunvenojn, en kiuj mi partoprenis kvarfoje kaj tri fojojn alparolis. Dum tiuj kunvenoj montriĝis: se oni prezentas Esperanton serioze, ankaŭ la akcepto estas serioza, foje eĉ surprize pozitiva. Sveda diplomato ekzemple reagis proksimume jene: "Vidu, gesinjoroj, ni povus paroli en Esperanto, kaj ni ne havus tiom da komunikadaj problemoj kiaj ni travivis dum ĉi tiu konferenco."

Laŭ mia sperto, niaj fakuloj povus forte influi la lingvopolitikon de Organizo de Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (la nova nomo de KSKE ekde nun), se ni povus montri ke malegaleca lingvouzo inter diverslingvanoj povas esti konfliktokaŭzo, kaj ke Esperanto povas kontribui al la forigo de konfliktoj.

**Oszkár Princz  
Hungaria Esperanto-Asocio**

# Espero, Fenikso, Bude Borjan

**Ulrich Lins, UEA-vicprezidanto, dum septembro kaj oktobro vizitis tri eŭropajn E-klubojn: en Sankt-Peterburgo, Riga kaj Zagrebo. Jen liaj impresoj pri la mallongaj sed intensaj vizitoj.**

Kiel statas la Esperanta vivo en klubo kiu aĝas pli ol cent jarojn? En Sankt-Peterburgo mi renkontis iom pli ol dek e-istojn en la deka etaĝo de malnova loĝdomo, kie Aleksandro Kogan, la prezidanto, disponigas sian loĝejon por la kunvenoj de la societo Espero, fondita en 1892. Dum trihora interparolado la 83-jara Barbara Cvetkova rememoris kiel ŝi pro korespondado kun eksterlando estis en 1937 vokita al la sekreta polico, kaj kiel ŝi spertis la teruran 900-tagan sieĝon de Leningrado fare de la germanaj trupoj.

Nun, kiam pasis la burokrataj malhelpoj, premas la falanta viv-nivelo. Ne estus mirige se mi konstatus plenan inertecon de la movado. Tute male. Peterburgo ĵus gastigis Duan Konferencon pri la Historio de Esperanto (24-26 sept.); la lokaj e-istoj eldonas ĉiumonatan bultenon, prizorgas per-Esperantan turismon, kaj preparas E-lingvan gvidilon, kies eldonon subvencias SAT — la asocio kiu 75 jarojn post sia 6-a kongreso denove kunvenos en Leningrado, en 1996. Pli frue, en 1995, la TEJO-anoj venos kongresi, kaj UEA organizos postkongresan vojaĝon al Sankt-Peterburgo.

La klubo Fenikso en Riga fondiĝis 20 jarojn post tiu en Peterburgo. La movado suferas ankaŭ en Riga pro la novaj prioritatoj, sed restas aŭ revenas modera optimismo. La juna prezidanto de Latvia E-Asocio, Māris Jākobsons, sukcesas inspiri siajn kunagantojn, inter kiuj superregas inoj. La heredaĵon flegas Saulcerite Neilande: ŝi faras esplorojn pri la historio de la latva movado. La tradiciaj Baltaj E-Tendaroj havas nun malgrandan nombron da partoprenantoj, ĉefe pro

la vojaĝproblemoj de rusoj, sed ankaŭ okcidentaj turistoj estas malhelpataj de la komplikeco de lim-trapaso. Tamen mi kuraĝigis la e-istojn en Riga jam nun pensi pri regiona Esperanto-kongreso en 1997.



Spomenka Ŝtimec kaj Ulrich Lins ĉe la Zagreba vicurbestro

La klubo en Zagrebo nomiĝas Esperanto-Societo Bude Borjan. Ĝia ejo estas de jardekoj en la strato Amruŝeva. Kunvenis tie por prelegeto mia trideko da homoj el ĉiuj aĝgrupoj. Bone impresis la videbla ĉeesto de gejunuloj, dank' al kiuj la Studenta Esperanto-Klubo, fondita en 1957, sukcesas ĉiam replenigi siajn vicojn. En 1993 aliĝis al kursoj

80 gejunuloj, el kiuj pluraj tuj partoprenis internaciajn aranĝojn. Ilia aktivado verŝajne ŝuldiĝas al decida strebo eskapi la depriman influon de la ĉirkaŭaĵo.

La proksimeco de la milito estis sentata en la societa kunveno: partoprenis fuĝinto el Bosnio, aliaj ĉeestantoj perdis parencojn en la milito. La Zagrebaj esperantistoj faras multon por mildigi la suferojn de la viktimoj, distribuante help-pakaĵojn por e-istoj en Sarajevo kaj aliaj lokoj, zorgante do pri praktika sekvo al la donacoj por Konto Espero. Kortuŝite oni rakontis al mi ke iun tagon la uzantoj de la klubejo trovis en leterkesto mesaĝon de serbo el Beogrado, kiu kaŝe vizitis Zagrebon.

Bedaŭrinde, Internacia Kultura Servo, la kreinto de pupfestivaloj kaj aliaj gravaj laboroj, nun ne plu multe utiligas Esperanton. Kaj Kroatia Esperanto-Ligo, la landa asocio de UEA, dormetas. Sed lastatempe la societo Bude Borjan decidis transpreni la ĉefan respondecon pri la refunkciigo de KEL. Gravas ke tiu tasko trovu subtenon, kaj tion mi petis de s-ro Božo Biškupić, la vicurbestro de Zagrebo, kiu akceptis min por aparta interparolo. Li informis min ke la urbaj instancoj helpas trovi novan lokon por la e-istoj, kiuj baldaŭ devos forlasi la straton Amruŝeva.

*Ulrich Lins (Germanio)*

## Invitu prelegantojn el Sarajevo!

Jam de preskaŭ tri jaroj la esperantistoj de Sarajevo ne povis forveturi el sia urbo, nek flegi movadajn kontaktojn. Nun ni provu helpi ilin — almenaŭ du el ili — unuafoje forlasi la militan etoson.

La Sarajevaj kolegoj pretas vojaĝi al kelkaj eŭropaj landoj (Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Nederlando), prefere jam **ekde februaro**, por prelegi al esperantista aŭ ne-esperantista publiko pri la situacio en sia urbo. Necesas zorgi, organize kaj finance, pri ilia restado en la sinsekvaj urboj de la preleg-turneo kaj pri la vojaĝo inter tiuj.

Ĉu via klubo/asocio pretas kunlabori por plenumi ĉi tiun tre konkretan peton el Sarajevo? Kontaktu la Centran Oficejon de UEA, kiu kunordigos kaj peros la proponojn.

# Bulgario: Kriza periodo

**La 45-a Kongreso de Bulgara E-Asocio kunsidis la 3-an kaj 4-an de septembro en Karlovo. Ĝi "pozitive taksis la strebojn por organiza kaj financa stabiliĝo de la Asocio" kaj aprobis politikon de maksimuma ŝparado.**

**L**aŭ la estrara raporto la E-kursoj ĉe la Pedagogia Instituto de Vraca ĉesis pro ŝanĝo de la estraro, dum mankas informoj pri la E-instruado en la Sofia Universitato. La Bulgara E-Muzeo kaj -Biblioteko en Sofio estas fermita, ĉar necesas ordigi la ejon kaj trovi fakan prizorganton.

La iama Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, malfermita dum pli ol dek jaroj ekde 1979, "ne plu funkcias kiel E-centro. La urbestro de Smoljan [la urbo apud kiu ĝi situas] subskribis dokumenton, laŭ kiu la Kursejo fariĝas havaĵo de la komunumo... La administrantoj... ignoras BEA-n kaj ne akceptas [ties] invitojn por... ordigo de la problemoj".

El la firmaoj de BEA, Esperanto-Turist estis likvidita, sed restis nesolvitaj financaj problemoj; pri Pres-

Esperanto daŭras juraj diskutoj; nur Globus regule prezentas al BEA financajn raportojn kaj pagas al ĝi subvenciojn ĝis la limo de la leĝaj ebloj.

"Multaj societoj formale aŭ reale ĉesis funkcii... BEA ne povas subvenciadi la agadon de la societoj."

Kaj la kuraĝiga flanko? La 12-a Internacia Somera E-Universitato en Veliko Tarnovo estis "tre bone organizita kaj sufiĉe bone vizitita". Okazis literatura kaj deklam-konkurso, muzika seminario junie en Stara Zagora, kaj aliaj kul-

turaj aranĝoj. Regule aperas *Bulgara Esperantisto* (nun dumonata), kaj la interna informbulteno de BEA, *La Letero* (monata). Entute, laŭ la estrara raporto "la aktivado de la bulgaraj esperantistoj lastatempe pruvas ke la tradicioj de la movado estas tre fortaj kaj kredigas ke la Asocio povas travivi la krizan periodon." ★



**Bulgara E-Asocio devas troti pli singarde ol galopas "la traca rajdanto".**

## Pollando: PEA renoviĝas

**La 11-an kaj 12-an de novembro en Varsovio 49 delegitoj de la lokaj filioj partoprenis konferencon de Pola Esperanto-Asocio.**

**E**l la agad-raporto pri 1990-94 ili povis konstati ke la jaron 1990 markis granda aktiveco: aperis vortaroj E-pola kaj pola-E, libroj por komencantoj, gramatiko, kantaroj, pollingvaj informiloj. Apud diversgradaj korespondaj kursoj eĉ startis nova leterkurso por progresantoj.

Sed la periodon 1991-94 plenigis pli kaj pli profunda krizo. La leter-kurso

preskaŭ ĉesis pro manko de interesiĝo. La ĝenerala inflacio pli kaj pli pezis sur PEA, kiu fine devis forlasi eĉ la restintajn 2 ĉambrojn de sia iam 10-ĉambra luksa sidejo. Ekde januaro 1995 PEA ne plu havas pagatajn oficistojn.

Konfliktigis la rilatoj de la PEA-estraro kun sia propra turisma firmao Esperantotur, kreita ĝuste por financi la agadon de la Asocio. Ĉe la tribu-

nalo de Bydgoszcz daŭras proceso kontraŭ la gvidantoj de Esperantotur.

La konferenco vigle diskutis kaj multe planis. Laŭ la nova statuto senburokratiĝas la ĝisnuna strukturo kaj ebligas ekonomia agado de lokaj grupoj. *Pola Esperantisto* reeldoniĝos ekde januaro ĉiumonate. Disvolviĝos regiona translima kunlaboro, precipe en la t.n. eŭro-regionoj. Oni volas — per diskonigo de la praktikaj ebloj de E-o — allogi al la movado eksterulojn, ankaŭ donante fortan impulson al la lastatempe senfervora membraro.

Al la prezidanteco de PEA elektiĝis Jeremiasz Ratajczyk, 65-jara inĝeniero el Varsovio, tutlande konata specialisto pri netradiciaj energi-fontoj, e-isto jam de 35 jaroj. La estraron konsistigas parte tute novaj personoj: Jan Książek, Stanisław Mandrak, Bogdan Michalski, Zygmunt Nagaj, Ryszard Rokicki, Krzysztof Śliwiński, Zofia Turowska kaj Teresa Wrodycka.

La konferenco fermis tre malbonan etapon en la vivo de PEA, sed ni esperu ke la novaj prezidanto kaj estraro normaligos la situacion en la Asocio.

*Andrzej Pettyn (Pollando)*

### Ŝanĝoj ĉe Pola Radio

La 1-an de decembro ŝanĝiĝis kelkaj frekvencoj de Pola Radio. La du ĉiutagaj elsendoj en Esperanto nun aŭdeblas je:

|                            |            |       |       |       |       |
|----------------------------|------------|-------|-------|-------|-------|
| <b>14.30-14.55</b>         | <b>m</b>   | 31,50 | 41,18 | 41,99 | 48,90 |
| (Mez-Eŭropo: 15.30-15.55): | <b>kHz</b> | 9525  | 7285  | 7145  | 6135  |
| <b>21.30-21.55</b>         | <b>m</b>   | 48,90 | 50,00 |       |       |
| (Mez-Eŭropo: 22.30-22.55): | <b>kHz</b> | 6135  | 6000  |       |       |

Ambaŭ elsendoj estas aŭdigataj ankaŭ per satelito (la indikojn vd. nov., p. 186). Ĉela redakcio (Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-977 Varsovio, P.f. 46) oni povas ricevi senpage ampleksan informilon pri la E-elsendoj.

# Slovakio: Etnoj kaj naturo

**En 1992 la rusa sesio de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino (AIS) donis nomon kaj komencon al la projekto n-ro 1068 de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo (1988-1997): "Lingvo – kulturo – ekologio" (LKE), kies ĉefan parton formas la forumoj "Etnoj kaj Naturo" (ETNA).**

La projekton aŭspicias AIS kaj Mon da Kunagado; kunordigas la LKE-Centro de Akademio de Nova Pensado en Moskvo. Ĝi celas *konservon de la bona kvalito kaj diverseco de la natura kaj kultura vivmedio de la homaro*.

Dank' al tiu agadkadro, la Esperanta iniciato akiris oficialan agnoskon de la slovakiaj Unesko-komisiono, Akademio de Sciencoj, kaj Ministerio de Vivmedio. Trideko da renomaj akademaj institucioj el 12 landoj eniris la Internacian Patronan Komitaton.

*La sorto de la tuta projekto dependas de la unua forumo, ETNA '95, kiu okazos en Poprad (Slovakio) de la 26-a de junio ĝis la 5-a de julio.*

La kadra temo de la forumoj, "Rilatoj inter etno kaj naturo en aspektoj spirita, socia kaj ekologia", en ETNA

'95 estos traktata ĉefe koncerne la eŭropajn etnojn kaj ties vivzonon. La programoj grupiĝos en tri programoj: la *scienca* (4-taga konferenco kun sekcioj pri lingvo, kulturo kaj ekologio), la *arta* (Folkloro Festivalo, 30 jun. -2 jul.), kaj la *eduka-kleriga*.

Paralele al la konferenco, oni dediĉos seminarion al la esperantista mondvojaĝinto Tibor Sekelj, kiu naskiĝis en Poprad. La ĵugoslavia urbo Subotica (kie li longe vivis kaj forpasis) pretigas ekspozicion en Poprad pri liaj etnografiaj esploroj en 56 landoj, kaj planas ĝemeliĝi kun Poprad.

Estas atendataj de kelkcent ĝis kelkmil personoj al la programoj, al kiuj oni povas aliĝi en libera kombino. *Se multaj esperantistoj partoprenos, Esperanto rolos kiel pontita lingvo inter*

*la laborlingvoj.* Ni invitas profesinivelajn Esperanto-interpretantojn senpage partopreni la forumon.

Ni invitas ankaŭ diversetnajn *volontulojn* por diskonigi la projekton. Kaze de sukceso ni helpos ilin partopreni en ETNA '95.

Dank' al intertraktoj dum la UK en Seulo, jam konturiĝas ETNA'97 en Aŭstralio kaj posta ETNA en Ameriko. Aperis espero pri vere monda projekto, kie esperantistoj ludu gvidan rolon!

Aliĝu sen hezito; des pli ke ĉiu pago estas transdonebla al alia persono! Aliĝo kostas ĝis la 1-a de februaro 100 USD (50 por nepagipovuloj). Loĝado eblas je inter 8 kaj 53 USD tage.

Informojn petu ĉe UEA-delegitoj Milan Neubeler (Popradskej brigády 14, blok Slnečnica B, SK-058 01 Poprad, Slovakio; faks. +42/92/626-45) kaj Lev Medvedev (pr. Mira 196-44, RU-129128 Moskva, Rusio; tel/faks. +7/095/233-07-31, 206-97-90). Pagu al la UEA-konto "etna-y".

**Lev Medvedev**


**Prezidanto de Internacia Komitato ETNA '95**

## La Chaux-de-Fonds komunikas

**La eksterordinara Asembleo de Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds, Svisio, 29-a de okt. 1994), elektis kun grandega plimulto la Direktan Komitaton de KCE, por 1995-1997.**

La nova Komitato konsistas el gesroj David Buhlmann, Georges LAGRANGE, Marco Picasso, Giorgio SILFER kaj Jaqueline Vasserot. La Asembleo elektis d-ron Silfer prezidanto de KCE. Samtempe la Asembleo aprobis akton kun la ĝenerala gvidlinio por 1995, aneksan al la listo de la kvin elektitaj kandidatoj. Restis rezervo pri kelkaj detaloj, difinitaj inter KCE kaj Gastejo Edmond Privat (GEP – la fondumo posedanta la du domojn) antaŭ la fino de 1994: tiuj detaloj koncernas precipe la luon de la lokaloj fare de KCE ĉe GEP. Ambaŭflanke ekzistas la firma intenco trovi solvon konvenan al ambaŭ partneroj.

Fakte la Asembleo decidis unuanime ke KCE kaj GEP estos ekde januaro 1995 absolute sendependaj ne nur jure kaj organize, sed ankaŭ administre kaj



finance. [...] Tiu ĉi disigo atestas la pliboniĝon de la situacio ĉe KCE kaj GEP, kies ŝuldoj estas nun forte reduktitaj, kaj kies financa stato ne plu estas tiel riska kiel antaŭ du aŭ tri jaroj. La krizo de KCE, timata dum la lastaj monatoj, estas tiel evitita.

La nova Komitato de KCE antaŭĝojas pri la kunlaboro de ĉiu bonvolulo kaj elkore bonvenigas la legantojn de ĉi tiu komunikilo kiel kursanojn "ĉe la domparo".

**Mireille Grosjean,**

**prezidanto de GEP**

**Giorgio Silfer, prezidanto de KCE**

### Instrui en Japanio?

UEA urĝe serĉas instruistinojn kiu flue parolas la anglan kaj pretas intense instrui Esperanton dum ses monatoj en Japanio. Prefere temu pri persono el Okcidenta Eŭropo aŭ anglalingva lando. Kondiĉoj: pagita flugo al Japanio kaj reen, loĝado en propra ĉambro en familia domo, ĉiuj manĝoj, plus 75 000 enoj por poŝmono. Bv. skribi al la CO de UEA.

# Sindediĉo kaj senlaboro

**Dum siaj migroj Atilio Orellana Rojas daŭre revis pri halto iam en Afriko, pri kontakto kun la tiea e-istaro, pri ia propra kontribuo en kontinento kiun ĝis nun li neniam esploris.**

**D**u jarojn daŭris la preparlaboroj. La UEA-komisiito pri afrika agado, Hans Bakker, multe helpis min. Apogon monan mi trovis dank' al la malavaraj Fondaĵoj Carson, FAME kaj Afriko; lernomaterialojn donacis Internacia E-Instituto, Unuiĝo Franca por Esperanto kaj Seula Esperanto-Kulturcentro.

Post plurmonata restado en Azio, mi alteriĝis en la ganaa ĉefurbo Akrao, kie jam atendis min Cameron Sackey, la motoro de la loka E-movado. Surprize mi konstatis ke ankaŭ lia edzino, Maria, parolas Esperanton (poste mi malkovris ke ŝi estas la ununura esperantistino en la lando). Ili akceptis min kiel unu plian familianon.

En Akrao ĉiudimanĉe kunvenas la grupo Nova Vivo. Mi zorgas ĉefe pri tri membroj: du el ili jam instruas E-on, kaj la tria deziras tion fari. Ili lernas pri la Cseh-metodo, tre taŭga por ĉi tiu mondoparto, kie malabundas lernolibroj, kaj kie oni alfrontas ĉiam ĉeestantaron kun pluraj denaskaj lingvoj.

Mi vojaĝis, per taksio kaj buseto, ankaŭ al Achiasi, kie la ĉiam entuziasma Yao atendis min. Kvinope ni kunvenis dum pluvega posttagmezo kun anoj de la klubo Amikeco, kaj ili rakontadis al mi pri sia Esperantovivo. Imponis al mi la parola flueco de Boedie, kiu unuafoje kontaktis iun per Esperanto.

Ne nur Ganaon mi celis per mia afrika vojaĝo: veturado 12-hora sur trupleña ŝoseo portis min al Abiĝano, ĉefurbo de Ebura Bordo. Post la landlimo la buso estis dekfoje haltigita de policanoj malkaŝe postulantaj ŝmirmonon de kontrabandistoj. Tre malfrue vespere ni atingis Abiĝanon, sed telefonvoko

al la delegito, Hyacinthe Séka, ekigis mian restadon.

Necesis vere pilgrimi tra Abiĝano por kontakti la lokan e-istaron, ĉar la urbego kun du milionoj konsistas el pluraj duoninsuloj sur lago. Tial facilas klarigi la maloftecon de E-kunvenoj, des pli ke la grupo konsistas ĉefe el studentoj kaj senlaboruloj. Tamen, dimanĉe kunvenis 9 e-istoj, el kiuj 3 komencantoj. La lingvonivelo vere ĝojigis min, ĉar ĝi elmontras fortan sindediĉon, se oni konsideras ke pro la manko de lerniloj la plej-

multo lernis el vortaroj, kaj praktikas per Esperanto-revuoj kiuj pasas de mano al mano.

Mi eksciis ke inter la lokaj e-istoj troviĝas du togolandaj rifuĝintoj: ADJANOUVI Mensah kaj DOUMÉGNON Koffi. Babilinte pri instrumentadoj, mi lasis al ili materialon por memlernado ĝis la Tria Afrika Kongreso (23 dec. - 7 jan.), kiam ili seminarios kun mi pri instruado. Ankaŭ en Ebura Bordo mi vidis nur unu e-istinon: brave, Sophie!

Senlaboreco grave malhelpas la E-aktivadon ĉi tie. Por kelkaj Esperanto proponas ian pordon, ian eblon savi sin el tiu situacio. Multaj nutras la esperon pri invito al eŭropa Esperantujo. Aliflanke, ankaŭ Esperanto kontribuis al la senlaborigo de esperantisto. Kiel do? En 1987 la nuntempa prezidanto de la landa asocio, Ambroise

Yassi, vojaĝis al la tiam socialisma parto de Eŭropo, seminariis en Hungario kaj ĉeestis la 72-an Universalan Kongreson en Varsovio. Reveninte hejmen, li fariĝis suspekta pro restado en komunismaj landoj kaj estis maldungita. La lernejestroj timis ke oni povus enkonduki nedeziratajn ideologiojn pere de nia "danĝera lingvo".

*Atilio Orellana Rojas (Argentino)*



**Orellana Rojas (plej dekstre) kun membroj de la klubo Nova Vivo en Akrao**

## Ne lasu vin trompi

Jam de pluraj jaroj privatuloj en la tuta mondo ricevas leterojn el Niĝerio, kiuj promesas transpagon de grandaj sumoj. Ricevonte la sumegojn la adresitoj devas nur disponigi sian bankokonton kaj sendi subskribitan blankan folion. Tion la niĝeria moneksportisto rekompencos per 30% el la transpagaĵo. Poste tamen nenio alvenas; eĉ malaperas mono el la konto.

La trompitoj estas privatuloj kaj entreprenoj. Ili akceptis la kontakton kun la niĝeria instanco ĉar tiu konvinke, oficiale prezentas sian proponon.

Lastatempe ankaŭ iuj e-istoj en Niĝerio okupiĝis pri simila trompado. Ni avertas niajn legantojn rezisti la tenton riĉiĝi se ili ricevas tian leteron el Niĝerio. Ne reagu! Eventuale raportu vian sperton al UEA.

Kompreneble tion faras nur kelkaj individuoj. La granda plimulto de la niĝeriaj samideanoj havas nenian rilaton kun tiaj fi-trompoj. Ni ne kulpigu senkulpajn esperantistojn. Ni kulpigu nur la trompistojn, kaj eventuale nin mem se ni komplezas ilin.

*Hans Bakker (komisiito de UEA pri afrika agado)*



## Turismo = ŝanco utili

**En sept.-okt. 1994 Trude Sinno vojaĝis al Pakistano, Ĉinio kaj Nepalo kun nederlanda grupo. Ŝi estis kontaktinta e-istojn en Jhelum (Pakistano), Urumĉi (Ĉinio) kaj Katmanduo (Nepalo).**

**K**aj jen surprizo en Lahoro: atendis min ĉe la flughaveno je la 5-a matene e-istoj el Jhelum kaj Islamabad: Jamil Akhtar, Farooq Khan kaj d-ro Yousef Rahber. Ili zorgis pri la turisma programo de mia dutaga restado, kaj la vigla E-klubo kun ĉ. 25 membroj — ankaŭ simpatiantoj, kiuj helpas en gastigado, veturigo aŭ komputado — aranĝis vesperan kunvenon.

En Pakistano mi renkontis multajn idealismajn junulojn, kiuj sindone laboras por Esperanto, precipe en Jhelum kaj Murree. Pakistana E-Asocio (PAKESA) kunvenas dufoje jare, eldonas lecionojn pri la Korano kaj la regulan bultenon *Facila Esperanto*. Mi estis invitita al PAKESA-kunveno (8-9 sept.), sed mi devis rezigni por reatingi mian grupon ĝustatempe.

Norda Pakistano havas ege ĉarmajn pejzaĝojn. Ĉie ajn ni libere moviĝis kaj trovis ĝentilajn homojn. Problemo tamen estis la lingvo, kaj mankis turismaj gvidantoj scipovantaj rakonti pri tradicioj, kulturo ktp. Jen eblo helpi niajn pakistanajn amikojn: se vi flugos tien, la talentaj membroj de PAKESA povus zorgi pri via enlanda

vojaĝo (eble komence helpe de establita agentejo), ekz. aranĝi interurban transporton per buseto. Tiel PAKESA gajnus iom da mono por la movado, kaj ni ĝuus servon amikan, kompetentan, eble eĉ malpli koston.

Post tiu freŝiga E-etoso pakistana mi jam antaŭĝojis renkonti gesamideanojn en Urumĉi, Golmud kaj Lhasa (Ĉinio), sed mi ne sukcesis kontakti tiujn kies adresojn mi havis. Mi spertis ke en la vizitataj urboj la plejmulto de eksterlandanoj restas en manpleno da hoteloj: kial do lokaj e-istoj ne fiksu afiŝojn sur ties anonctabuloj, kiujn oni ja uzas por diversaj ofertoj?

La tria etapo kondukis nin al Nepalo, sed pro ŝanĝoj en la vojaĝplano ni restis eĉ ne tutan tagon en Katmanduo. Tial mi povis renkontiĝi nur kun la loka delegito, Gamvir Man Ŝresta, e-isto ekde la tempo kiam Tibor Sekelj vizitis Nepalon en la 50-aj jaroj..

Bedaŭrinde, ne restis tempo kontakti la Esperantan vojaĝagentejon pri kiu anoncis Bharat Ghimire. Sed la pitoreska Nepalo, kovrita de verdaĵoj, arbaroj, kristalklaraj riveretoj, estas la plej alloga kaj la turisme plej evoluinta

el la landoj kiujn mi vizitis. Do, Nepala E-Asocio, kiu ofertas diversajn ekskursojn, prave celas vojaĝemajn esperantistojn (Nepala E-Asocio, Bharat Ghimire, Sierra Tours, P.O.B. 3565, Kathmandu; faks. +977/1/228-194).

Alian eblon plifortigi la E-agadon mi vidas en pli densa kunlaboro inter la triangulo Islamabad-Urumĉi-Katmanduo. Vizoj por intervojaĝi en tiuj landoj pli facile haveblas.

Ĉi-riate mi raportu la vortojn de Amir Bashir Bhatti el Pakistano, kiu, survoje al iranaj e-istoj, rakontis ke tiuj suferas pro mankantaj kontaktoj kaj sopiras bonvenigi alilandajn vizitantojn. Li mem traveturis en septembro tutan Iranon pere de Esperanto, kaj opinias ke vojaĝado tie, ankaŭ por virinoj, estas sendanĝera kaj facila.

Ni nepre ne forgesu pri evoluigo de turismo per Esperanto! Tiukampe — en certaj landoj — ni havas ŝancon supervivi kiel utila asocio. La nuntempa situacio malkontentigas: mankas utilaj informoj kaj fidindaj kunlaborantoj, la delegita reto bezonas purigadon. Sed antaŭ ĉio: ĉesu ĉiu ajn rivaleco inter esperantistoj, kaj libere fluu la informoj por ebligi kunordigadon! Ni estas tiom malgranda asocio ke en la hodiaŭa mondo ni povos postvivi nur se ni firme kaj tutforte kunlaboras por komunaj celoj.

*Trude Sinno (Nederlanda)*

# 80-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Tampere (Finnlando) 22-29 julio 1995

Foto: MEK

## Konstantaj adresoj

CO de UEA (vd. kolofonon); 80-a UK, PL 338, FI-33101 Tampere, Finnlando; telefakso +358 31 652 124

## Invitleteroj

Kongresanoj bezonantaj vizon devas mem pruvi al konsulejo la posedon de monrimedoj sufiĉaj por resti en Finnlando; ankaŭ ekssovetianoj, ĉar finnaj konsulejoj ne plu konsideras invitleterojn el Finnlando. Kongresanoj kiuj mendis kaj pagis loĝadon tra UEA, povas ricevi de LKK ateston pri tio. UEA daŭre sendos invitojn nur al landoj kie tio necesas por akiri pasporton. Tian leteron oni sendas nur al kongresaj aliĝintoj.

## Dua Bulteno

Ĝi atingos la plej multajn el vi jam en januaro, kun ĉiuj necesaj informoj.

## Loĝado

Inter la pli ol dudek diversaj loĝejoj plej multas ĝuste la malaltkostaj. LKK rezervis pli-malpli ĉiujn tiajn lokojn en Tampere. Preskaŭ ĉiuj loĝejoj troviĝas ne pli ol du kilometrojn for de la kongresejo. Organizantoj de vojaĝgrupoj turnu sin rekte al la CO.

Modesta sed komforta hoteleto en Tampere akceptas kontraŭ malaltaj prezoj kristanojn nefumantajn, en ĉambroj kun 1-5 litoj. Interesatoj kontaktu la CO.

## Postkongresoj

**Oficiala Postkongreso en Estonio:** Ĝi celos la ĉefurbon Tallinn, la historian Tartu, la apudmaran ripozurbon Pärnu kaj la pitoreskan insulon Saaremaa. En ĉiuj urboj oni renkontos lokajn esperantistojn. Necesas mendi frue, pro la limigita kvanto de lokoj. Prezo: 975 gld. (por loko en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, ĉiuj programoj kaj transportoj); krompago por unulita ĉambro 385 gld.

**Sankt-Peterburgo:** El la du ekskursoj ĉi-urben, la unua estos 5-taga kaj startos tuj post la UK per buso; la dua, 3-taga krozo per luksa ŝipo, komenciĝos la 3-an de aŭg., kaj estos kombinebla kun aliaj postkongresoj (Estonio, Orient-finna Lagoregiono). Loko en dulita ĉambro kostas 1265 (busa) resp. 880 gld. (kroza).

**Finnlando:** Ni celos la plej finnajn pejzaĝojn: la Orientan Lagoregionon (1040 gld., loko en dulita ĉambro); kaj la plej nordan, t.e. Laponion.

Ambaŭ ekskursoj tra Laponio promesas neforgeseblan aventuron sub la polusa somera suno: por turistoj (1120) kaj por migrantoj (705).

## Aliĝoj

Antaŭ la komenco de decembro aliĝis pli ol 600 personoj el 48 landoj. Plej multas (post finnoj) germanoj, nederlandanoj, japanoj, britoj, poloj, italoj, svedoj, brazilanoj kaj koreoj.

## Kotizoj

Inter la 1-a de jan. kaj la 31-a de marto, en guldenoj (parenteze la sumo por la landoj kun tarifo B): individua membro de UEA (IM) 270 (202); ne-IM 338 (252); komitatano/kunulo/junulo/handikapulo mem IM 135 (101); kunulo/junulo/handikapulo ne-IM 202 (151).

## Oficiala flugkompanio

Finnair, la renoma nacia kompanio de Finnlando, havas multajn bonajn konektojn el Eŭropo, Nord-Ameriko kaj Azio. Ĝi povas oferti tre favorajn flugprezojn, precipe por grupoj. Nepre informiĝu rilate vian propran landon. UEA ĉi-foje organizos nur la vojaĝon el Amsterdamo (ĉ. 830 gld). ★

# Grabowski: Rento por talentoj

**Ankaŭ en 1994, kiel ĉiujare, Fondaĵo Grabowski aljuĝis subvenciojn al homoj aŭ organizaĵoj kiuj sin distingis en la kampo de la Esperanta kulturo.**

Fondaĵo Grabowski estis starigita en 1982, laŭ iniciato kaj malavara financa kontribuo de s-ro Adamo Goralski. Ĝi konsistas el kapitalo en usonaj dolaroj, kaj al ĝi povas kontribui kiu ajn, per 50 USD aŭ ties pluroblo. La kapitalon administras la CO de UEA kaj el ties rento oni pagas la subvenciojn. Ĝis nun FG jam aljuĝis dekojn da monpremioj al eminentaj verkistoj, gazetoj kaj eldonejoj, kulturaj organizaĵoj, pluraj promesplenaj junaj talentoj, kaj multaj aliaj.


En 1994 la juĝkomisiono, kiu nun konsistas el Ulrich Lins, Aldo de' Giorgi kaj MINE Yositaka, interkonsentis direkti la atenton aparte al landoj kun financaj malfacilaĵoj, kie, cetere, oni konstatis lastatempe nekutiman plivigliĝon de tre altmeritaj iniciatoj, precipe en la eldonista sektoro. Tial, post longaj korespondaj diskutoj, la premioj estis aljuĝitaj jene [kiel jam notite en sept., p. 151]:

La unua premio estis dividita kaj asignita egalsume al du eldonejoj en Rusio: Impeto el Moskvo (500 USD) kaj Sezonoj el Jekaterinburg (500 USD). La dua premio iris al la revuo *Rok-Gazet'* el Francio (264 USD), dum la trian kaj kvaran premiojn ricevis du revuoj el Ĉinio, *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj* el Pekino (150 USD) kaj *Penseo* el Guangzhou (113 USD). Aldonindas ke FG atribuas regule subvenciojn ankaŭ al la Adopta Kaso de UEA, kiu helpas por partopreno en UK (145 USD por Seulo), kaj al Ligo Internacia de Blindaj E-istoj (75 USD).

La eldonejo Impeto estas prizorgata de geedzoj Ŝevĉenko kaj jam eldonis plurajn gravajn kaj tipografie belajn librojn, i.a. *Rememoroj de centprocenta esperantisto*, de A. Saĥarov; *Malfacilas esti dio*, de A. kaj B. Strugacki; *Legendoj pri SEJM kaj Oni ne*

*pafas en Jamburg*, ambaŭ de M. Bronŝtejn. Impeto krome zorgas pri la revuo *Moskva Gazeto*.

Eldonejo Sezonoj, direktata de la geedzoj Halina Gorecka kaj Aleksandr Kor-



**Neortodoksa lingvouzo en Rok-Gazet' ne malhelpis la premiigon ĉe Fondaĵo Grabowski.**

jenkov, antaŭ longe komencis eldonadon de verkoj en Esperanto je "samizdata" (= memeldona, subtera) nivelo. Lastatempe ĝi konsiderinde plifortiĝis kaj specialistiĝis pri tradukoj de gravaj verkoj, precipe ruslingvaj. Jen nur kelkaj citindaj: *La Majstro kaj Margarita* de M. Bulgakov (trad. S. Pokrovskij), *Krimo kaj puno* de F. Dostojevskij (trad. A. Parfentjev), *Sveda alumeto* de A. Ĉeĥov (trad. A. Korĵenkov). Sezonoj eldonas ankaŭ la revuojn *La Ondo de Esperanto*, *Ruslanda Esperantisto* kaj *Spektro*.

*Rok-Gazet'* estas porjunulara (sed ne nur — ĝi plaĉas ankaŭ al la skribanto), primuzika gazeto, eldonata de Eurokka (Esperanto-Rok-Asocio) en Donnevill, Francio. Ĝia ĉefredaktoro estas Bertrando Albault, kaj ĝi celas "disvastigi kaj diskonigi Esperanto-rok/pop/folk/kanzon/faz-muzikojn, eĉ malrokmuzikon, al esperantistaro kaj ne-esperantistaro". La revuo naskiĝis en 1990, kaj ĝis nun aperis sep grandformataj, kolorkovrilaj, dikaj numeroj, ĉiuj plenaj de plej multspecaj

kontribuoj, riĉaj je fotoj, ilustraĵoj, desegnoj, bildstrioj ktp. Aldonindas ke ĉe Eurokka aktivas ankaŭ la diskoeldonejo Vinilkosmo, kiu, post disketo de la ensembloj Amplifiki kaj Rozmariaj Beboj, preparas kompaktdiskon kiu antologias la produktadon de e-istaj "bandoj".

*Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj* estas trimonata, grandformata, 76-paĝa revuo, eldonata de Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio en Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi fondiĝis en 1985 kaj havas la celon "kun Esperanto kiel perilo, konduki internacian sciencon kaj teknikan interfluan". Redaktas ĝin Shen Chenru. La revuo jam akiris vastan renomon kun abundo da diverstemaj, tre interesaj kaj internaciaj artikoloj.

*Penseo* estas malgranda tamen simpatia beletra revueto, kiu regule aperas ĉiumonate ekde 1990, eldonata en Guangzhou de Lin Liyan kaj redaktata de Shi Chengtai.

Fine mi deziras esprimi alvokon al ĉiuj legantoj. Laŭ la statuto de Fondaĵo Grabowski ĉiu kontribuanto al la fondaĵo rajtas proponi kandidatojn por ĝiaj subvencioj. Mi kiel sekretario de la juĝkomisiono (Aldo de' Giorgi, Via M. Anzi 19, IT-22100 Como, Italio) pretas atenti (kaj esperas abunde ricevi) informojn, sugestojn kaj atentigojn de kiu ajn, ankaŭ sinproponojn.

Je la fino de ĉi tiu artikolo mi ripetas — kiel ĉiujare — ke kontribuoj al Fondaĵo Grabowski estas ĉiam eblaj kaj bonvenaj. Se la kapitalo plialtiĝos, nur pli gajnos la Esperanta kulturo.

*Aldo de' Giorgi, Sekretario*

**La PLEJ OFTA,**  
kaj unu el la plej interesaj...

## Eventoj

Petu senpagan provekzempleron:  
pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario

# Kunligilo de landoj kaj popoloj

**Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) apartenas al la plej malnovaj kaj plej multnombraj fakaj asocioj en nia movado, kaj estas unu el tiuj plej frue aliĝintaj al UEA.**

Post alvoko en *Esperanto* (marto 1909) de franca kolego, Armand Berlande, 11 fervojistoj (anglo, aŭstro, dano, germano, polo kaj francoj) fondis nian organizaĵon la 7-an de septembro 1909, dum la 5-a UK en Barcelono, tiutempe sub la nomo Internacia Asocio de la E-istoj Fervojistoj (IAEF). La asocio difinis kiel celojn propagandon de la Zamenhofa Esperanto, starigon de terminareto, interŝanĝon de profesiaj ideoj, kaj faciligon de reciprokaj vizitoj de fervojistaj infanoj. Ekde decembro 1910 ĝis julio 1914 aperadis propra organo, *Fervoja Esperantisto*. El diversaj protokoloj estas konstateble ke fine de la jaroj 1909, 1910, 1911 kaj 1913 oni registris 63, 177, 214 (el 15 nacioj), resp. 227 membrojn.

La unua mondmilito interrompis la evoluon kaj agadon. Post la milito la kolegoj Josef Blažek (ĉeĥa) kaj Georg Habellok (germana) komencis revivigi la organizaĵon. Dum la 13-a UK en Prago, la 2-an de aŭgusto 1921, 27

fervojistoj el 5 landoj restarigis IAEF, sub la prezido de Habellok. Pro la postmilitaj malfaciloj kaj precipe pro la terura germana inflacio, la agado tamen stagnis. En 1924, dum la 16-a UK en Vieno, pro kverelo certa nombro da aŭstroj kaj germanoj fondis duan internacian organizaĵon (Tutmonda E-ista Fervojista Ligo) sub la gvido de Hugo Steiner, sed jam komence de 1925 ili decidis reveni. Dume la lerta redaktoro Ilija Puhalo (Jugoslavio) faris el *La Fervojisto* seriozan internacian fakrevuon, kvankam ĝi foje aperis neregule — interalie pro malsanoj de Puhalo, kiu mortis en 1937, nur 38-jara.

La dua mondmilito denove interrompis la funkciadon. Okaze de la 21-a SAT-Kongreso en Amsterdamo (1948), fondiĝis la nuna IFEFF kun 250 membroj. En la sama jaro IFEFF sukcesis ekaperigi bultenon, kiu en 1958 transformiĝis al *La Internacia Fervojisto*. (En 1970 malaperis la artikolo *La kaj modernigi la aspekto*.)

En majo 1949 la juna IFEFF travivis sian unuan grandan aranĝon, kongreson en Danio. Ekde tiu jaro IFEFF organizas kongreson ĉiujare (en 1995: Pécs, Hungario, 20-26 majo). Post la dua mondmilito konstanta evoluo karakterizas nian movadon, kaj ĝi fariĝis la plej forta kaj plej aktiva organizo ligita al UEA.

Nuntempe IFEFF havas 24 landajn asociojn kun 1800 registritaj membroj. Kadre de ĝi funkcias Faka Komisiono, kiu konsistas el Terminara kaj Fake Aplika Sekcioj.

La Terminara Sekcio aktivis ekde 1950, kaj ĝi konsistas el fakuloj diverslandaj. Pluraj landaj asocioj eldonis fervojfakan terminaron. La plej granda rezulto de tiu sekcio estas la traduko kaj eldono (1989) de seslingva faka terminaro de Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC), enhavanta pli ol dek mil pure fervojfakajn terminojn. Ĵus, en aŭtuno 1994, pretiĝis ties nova, kompaktdiska eldono.

La Fake Aplika Sekcio komencis funkcii en 1959. En la IFEFF-kongresoj la plej grava programero estas la ĉefa fakprelego, kiun ĝenerale la organizanta lando preparas kaj prezentas. Ekde 1981 tiu sekcio kompletigas la programon per 8 ĝis 12 t.n. "fakprelegetoj" pri la plej freŝaj novaĵoj el diversaj landoj. Krome la Sekcio zorgas pri daŭra apero de fakartikoloj en *Internacia Fervojisto* kaj en revuoj de la landaj fervojistaj E-asocioj.

Pluraj landaj asocioj atingis aperrigon de esperantlingvaj klarigoj en la fervoja horarlibro de sia ŝtato.

IFEFF antaŭ longe elektis sian sloganon "La fervojoj kunligas la landojn, Esperanto la popolojn". Sub la signo de tiu ĉi slogano laboras la fervojistoj. Jam de longe estas nia korafero ke la internacia lingvo servu la fakajn agadojn. La fervojistaj esperantistoj konstante aplikas Esperanton sur la faka tereno, kaj ili ĉiuj volas disvastigi tiun ĉi ideon!

*István Gulyás,  
vicprezidanto de IFEFF  
(Rákoss u. 98.I.9,  
HU-1155 Budapest,  
Hungario)*

**Rekte, kuraĝe, eĉ se flankiĝante: IFEFF progresas kiel la fulmtrajno Pendolino.**



# Michael Jackson kaj Esperanto

La tutmonde konata rokmuzika idolo, Michael Jackson, uzas Esperanton en tri-kaj-duon-minuta videofilmo, kostinta ses milionojn da dolaroj, kiu reklamas lian baldaŭ elirontan K-diskon *History* ("Historio"). Kian rolon ludas nia lingvo en la filmo, ne estas certe, ĉar — kiel kutime — ĉion ĉirkaŭ Jackson envolvus reklamcela mistero. La filmeto, farita en Budapeŝto en 10 tagoj, prezentas Jackson kiel liberiganton de orient-eŭropa popolo. Sur la sola foto el la filmo kiun lia agentejo disponigis al gazetoj (dekstre), videblas soldatoj kies brakbendon ornamas stelo — eventuale verda. Bernice Garrett, usona UEA-fakdelegitino, kiu estis dungita traduki por Jackson, konfirmas ke "Esperanto estas multe uzata en la filmo. Infanoj kantas [Esperante]: 'Mi amas vin, Michael Jackson'." Ni atendu kaj atentu la lanĉon de la filmo, por taŭge profiti en nia informado la famon de Michael Jackson kaj lia muziko.



## JUNULARO

### Seminario: Kio estas regiono?

**Dum aŭtuneca pluva semajno (29 oktobro-4 novembro) kunvenis en la mezepoka ĉeĥa urbeto Kutná Hora trideko da seminariemaj esperantistoj el 18 landoj por pritrakti la temon "Regiona kunlaboro en Eŭropo — ĉu motoro por la eŭropa integriĝa procezo?".**

Jam la unuan tagon komenciĝis vigla diskuto pri la difino de "regiono". Paco Belmonte Sánchez (Katalunio) en sia interesa prelego donis geografiajn kriteriojn kaj emfazis dividon laŭ orientiĝo al diversaj maroj. Dum la posttagmezo kadre de kelkpersonaj laborgrupoj ni klopodis apartigi la ĉefajn eŭropajn regionojn.

Dum la sekvaj tagoj ni prezentis unu al alia la kunlaboron en niaj deven-regionoj. Temis pri Maslando (Ivo Miesen, Nederlando), Nordio (Martin Weichert, Svedio), Alp-Adrio (Ele-

na Zerpini, Italio; Nora Csiszár, Hungario), Kaliningrada regiono (Maksim Kejda, Rusio), Bjelorusio (Mikola Ramauski), Kartvelio (Aleksandro Levidze) kaj eks-Jugoslavio (Zoran Ćirić).

La seminarian programon kompletigis invititaj prelegantoj, profesiuloj pri la temo. Barbara Despiney (Francio) ne nur konatigis nin kun la Eŭro-regiono Nisa, sed ankaŭ prezentis la aktualajn ekonomiajn fenomenojn en Orient-Eŭropo kaj Ekstrema Oriento. Michael Cwik (Belgio) parolis pri

estontaj strukturoj en la Eŭropa Unio, menciis ekonomiajn problemojn de la komuna merkato, kaj fine klarigis federalajn konceptojn.

Dum la posttagmezoj ni vigle labor-grupis pridiskutante ekonomian kaj ekologian kunlaboron, fantaziis pri kultura programo en la jaro 2000.


Ankaŭ ĉi-foje okazis la tradicia vespero kun gustumado de regionaj specialaĵoj, same ne mankis la TEJO-prezento en amuza formo. Alivespere ni spektis la filmon *Babel* kaj konkursis pri Esperanto-literaturo.

Dum lasttaga vizito al Prago, profesoro de Mez-Eŭropa Universitato prezentis al ni sian opinion pri nia seminario temo.

Eĉ se ni ne sukcesis precize difini la nocion "regiono", tamen ni pasigis agrablan kaj utilan semajnon en Kutná Hora.

*Nora Csiszár (Hungario)*

# Recenzoj



## Ĉiu silabo aludoplenas

**Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj.** Div. aŭtoroj. Komp. Wang Yanbo, Ren Guang. El la ĉina trad. Laŭlum. Ilustraĵoj de Yang Yongqing. Dulingva. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1990. 63p. 19x27cm. 13,80 gld.

Jen kolekto da ĉinaj poemoj, ĉefe el la Tang-dinastio (618-907). Temoj: romantiko, foriro, adiaŭo, pejzaĝo. En la Tang-poezio kolektiĝas konfucea moralo, taoisma mistero kaj budhisma realo. Postajn poemojn karakterizas rafinitaj temaro kaj tekniko, sekve ankaŭ iom perdita freŝeco.

Poemoj ĉinaj estas koncizaj kaj plenaj de ideasocioj. Ĉu entute eblas transdoni la koncizecon, la rimojn (kiuj baziĝas sur tono kaj silabfinaĵo), la pensadon, la fonon? Ĉu la Esperanto-versio de la poemoj eĉ iom trafas la "ĝustan" sencon?

Mi ne senreviĝis legante, nek tute konvinkiĝis, sed ja entuziasmiĝis. Kvankam la traduko palas kompare kun la originalo, kelkloke ĝi estas pli inventema kaj fleksebla ol la ŝablona ĉina. Sed en Esperanto mankas la kultura fono, la ideoj kaj aludoj kiuj trafenetris ĉiun karakteron en la ĉina. Necesus antaŭparolo, por klarigi la ĉefajn trajtojn kaj temojn de la poemoj. Tamen, eblas ankaŭ nur ĝui la

libron: la bildoj estas belegaj, humuraj, kaj bone ilustras la enhavon. La etaj klarigoj en la ĉina sufiĉe klaras — sed ili estas por ĉin(olog)oj.

Mi levas la ĉapelon por Laŭlum, kiu sukcesis plenumi la malfacilan taskon traduki kvin- aŭ sepsilaban version, kie ĉiu silabo plenas de aludoj, al bela, flua Esperanto kun rimoj (eĉ kie la ĉina ne havas kaj ne bezonas). Ne-eviteble la traduko kelkloke iom pezas, sed ĝenerale la rezulto estas laŭdinda.

*Sabira Ståhlberg  
(Germanio)*



Ilustraĵo de Yang Yongqing

## Pasio malofta

**Versoj.** A. Rudaki (ĉ. 860-ĉ. 941). Duŝanbe, 1991. El la farsia trad. B. Tornado. 80p. 21cm. 4,50 gld.

Rudaki estas plej nekonata sed plej koninda mez-azia verkisto. Profunde ligita al la persa versa tradicio, li konsideriĝas la plej granda novkreinto de la persa-taĝika heredaĵo poezia.

Rudaki miksis en siaj diversformaj poemoj konsilojn kun foje religia tono, priskriboj momentaj kaj pejzaĝaj, pensoj flugantaj pri la tempo fluanta. La Virino ludas la ĉefrolon de poemobjekto; ĉiu movo kaj ĉiu buklo ŝia estas zorge priskribata, per pasio nemiskomprenbla kaj malofte renkontata.

La traduko estas zorge farita; ĝia lingvaĵo kreas etoson iom similan al la persa-taĝika ornama stilo de la originalo. Ekzotikigas la poemojn vortoj kaj nomoj magie sonantaj; surprizaj vortelektroj kreas bildojn neatenditajn. ss

## La simpla, simplamaniere

**Kaj ni solas.** Heinz Kahlau. El la germana trad. István Ertl. Bellinzona/Budapeŝto: Hans Dubois, 1991. 65p. 22cm. 18,90 gld.

"La vivo estas tamen ja plej bela," asertas Heinz Kahlau en unu el la 46 eroj de ĉi kolekto; "...se ĝi estus trioble malfacila / kaj krome trioble pli longa — / mi ŝatus ĝin vivi." Se tia optimismo nuntempe surprizas, ĝi eĉ pli necesas — ne nur en la malaperinta hejmlando de la poeto, sed same en unuigita Germanio, kaj en la mondo.

Ĉar Kahlau ne evitas la nigrojn en la vivo: lia "tamen" havas pezon. Ampoemoj temas pri disiĝo, vizioj kondukas al morto, la homojn delogas karieroj, urba vivo kaj potenco. Eĉ pri si mem la poeto asertas: "Mi restas monstro, / kiu ŝatus homi." *Homi* tamen restas eble, same kiel amo kapablas daŭri 60 000 jarojn, silente kaj senbrue — ĉar "mallaŭta povas esti / ĉio vera", kaj la fundoj de la homa naturo ne koneblas.

La tradukinto Ertl nomas siajn lingvajn akrobataĵojn "ne mortdaŝgeraj". Sed Kahlau starigas propran defion, eviti ĉion superfluan. "Mi amas vin / signifas: / Mi min volas / kia vi min bezonas — / via ombro": ĉirkaŭ tiaj mirakloj de koncizeco lia poezio konstruas sin. "Mi povas diri nur aferojn simplajn," li konfesas alipoeme. Multaj malpli talentaj aŭtoroj nur revas pri tia respondo al la defio de Auld, "diri la simplan simplamaniere", kaj ĉi-foje Ertl same meritas nian aplaŭdon.

Tiu ĉi libreto, plaĉe kompostita (tamen kun kelkaj ĝenaj apostrofaj misoj), estas la lanĉa ero en serio de "modernaj poetoj en traduko". Nia literaturo, kio volas diri: nia komunumo, bezonas pli da tiaj lukoj al la aktuala mondo.

*Mark Fettes (Kanado)*




**Ĉu vi jam rekotizis por 1995?**

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA.

*Antaŭdankon!*

# Laste aperis



**Bibliografio de la verkaro de Henri Vatré.** Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1994. 16p. ISBN 3-927613-34-7. 21cm. Antaŭlaboro por *Tekste kaj pretekste*, aperanta kolektita verkaro de Vatré. 5,70 gld.

**Dr. Esperanto, the man full of hopes.** Hanna Zamenhof-Zaruski (1953). Tokio: IKL, 1993. 22p. 21cm. Ilus. Rakonto pri Zamenhof por geknaboj. 10,20 gld.

**25 jaroj de ĈEA 1969-1994.** Komp. Miroslav Malovec. Praha: ĈEA, 1994. 64p. ISBN 80-901334-4-4. 20cm. Dulingva. Historia skizo pri Ĉeĥa E-Asocio, kun listoj de kluboj, funkciuloj, eminentuloj ktp. 3,00 gld.

**Esperanto en superaj lernejoj '91.** Div. aŭtoroj. Shanghai, 1991. 79p. 18cm. Dek unu artikoloj, plejparte pri gramatikaj problemoj. 4,50 gld.

**Esperanto en superaj lernejoj '93.** Div. aŭtoroj. Shanghai, 1993. 83p. 18cm. Naŭ pedagogiaj kaj movadhistoriaj artikoloj. 4,50 gld.

**Esperanto simple. Kurso de la internacia lingvo en 7 lecionoj.** Lilia Fabretto. Romo: Tutmonda E-ista Vegetarana Asocio, 1991 (3-a eld.). 76p. 17cm. Ilus. Kun kasedo. Por itallingvanoj. 7,50 gld.

**Esperanto za naĉinaeŝči.** Ljubomir Trifončovski (1958), Kiril Velkov (1944). Bulgaringva. Vraca: M&W, 1994. 19p. 21cm. Mallonga prezento de Esperanto: celoj, gramatiko, bazaj vortoj kaj esprimoj. 3,00 gld.

**Evoluo de la mondkulturo, La. Intelligor omnibus.** Jeremi Gishron (1948). Jerusale: Centro Sivron, 1994. 24p. 14cm. Eseo pri la potencialo de Esperanto krei mondkulturon. 6,00 gld.

**Gvidlibro pri aŭtodidakta lernado de konversacio por esperantistoj.** Krizantemo [KIKUSIMA Kazuko]. Toyonaka: Japana E-Librokooperativo, 1994. 127p. ISBN 4-930785-40-5. 17cm. Dulingva: japana-E. Konsiloj precipe — sed certe ne nur — por japanoj. 12,00 gld.

**In memoriam Dr. Kalocsay Kálmán. (1891-1976).** Ada Csiszár (1930). Budapest: Amika Societo K.K., 1994. 100p. 21cm. Hungaringva. Priskribon vd. p. 16, sub "Kalocsay". 12,00 gld.


**Komputila Rondo. Adresaro 1994/95.** Red. J. Wulff. Hamburg: KompRo, 1994. 22+12p. 21cm. Adresoj de pli ol cent komputilantoj el 26 landoj + listo pri E-aĵoj en la elektronika reto (okt. 1994). 6,60 gld.

**Krems. Malgranda gvidlibro.** El la germana. Wien: Aŭstria E-Movado, 1994. 51p. 18cm. Dulingva. Okaze de la 46-a IFEF-kongreso, kunveninta en tiu ĉe-Danuba urbo. 17,40 gld.

**Kvar teatraĵoj.** CULBERT Ruto (1911). El Cerrito: ELNA, 1994. 148p. 30cm. Plejparte premiitaj pecoj de emerita profesia aktorino kaj reĝisoro. 24,00 gld.

**Lingvo kaj kibernetiko.** Red. kaj trad. D. Maxwell, M. Preotu, A-P. Tacu. Dobřichovice: Akademia Libroservo, 1994. 143p. ISBN 80-85853-03-5. 21cm. Prelegoj pri lingvo kaj kibernetiko, de la 6-a kongreso (1993) de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko. Plenaj tekstoj aŭ resumoj en Esperanto. 20,10 gld.

**Milito kontraŭ salamandroj** (1936). Karel Čapek (1890-1938). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. Dobřichovice/Praha: KAVA-PECH/ĈEA, 1994. 197p. ISBN 80-85853-01-9. 21cm. Intrigoplena, fantazia romano pri la senpovo de la homo kontraŭ ribelantaj amfibiaj robotoj. 18,00 gld.



Čapek kaj Hašek: du ĉeĥaj majstroj en zorga traduko

**Ne nur soldato Ŝvejk. Elektitaj rakontoj.** Jaroslav Hašek (1883-1923). El la ĉeĥa trad. Stanislav Kamaryt k.a. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1994. 246p. ISBN 80-85853-05-1. 20cm. Red. Miroslav Malovec. Kvardeko el la pli ol mil rakontoj de mondfama ĉeĥa satiristo. 25,50 gld.

**Notoj pri konveksaj optimumproblemoj. Notoj pri lineaj optimumproblemoj. Notoj pri logiko.** Volframo Distel' (1969). Lepsiko: la aŭtoro, 1994. 11, 14, resp. 14 p. 21cm. Tri broŝuroj. Po 5,10 gld.

**Perspektivoj de la Ilustralo.** Karolo Pič. Saarbrücken: Iltis, 1994. 23p. ISBN 3-927613-35-5. 21cm. Eseo pri PIV el 1978, parto de aperanta esperantologia esearo. 7,50 gld.

**Por la familio** (1976). A. López Luna (1914). El la hispana trad. Ricardo de Ajax. Buenos Aires: Amigos de López Luna, 1994. 88p. ISBN 950-43-5625-7. 16cm. Triakta komedio. 7,80 gld.

**Stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto, La.** Dobřichovice: KAVA-PECH, 1994. 20p. 21cm. Preleg-resumoj de la samtitola kolokvo de la Akademio de Esperanto (julio 1994). 3,00 gld.


**Variacioj pri la realo** (1989). Ĝerardo Vakano (1929). El la itala trad. Amerigo Janakono. Venafro: EVA, 1994. 129p. 21cm. Dulingva poemaro. 19,80 gld.

**Verkoj de Miyamoto Masao 4.** Toyonaka: Japana E-Librokooperativo, 1994. 303p. ISBN 4-930785-39-1. 21cm. Kolektitaj E-lingvaj originaloj kaj tradukoj. Kun bibliografio kaj kronologia tabelo (parte japanlingvaj). 73,50 gld.

## DIVERSAĴOJ

**Vidbendoj: Israelo 5753.** Reĝ. Roman Dobrzyński. Varsovio, 1994. VHS-PAL. 23-minuta. Portreto de la lando kaj de lokaj esperantistoj en 1993. 52,50 gld.

**Kristnasko en Salvadoro.** Reĝ. R. Dobrzyński. Varsovio, 1994. VHS-PAL. 22-minuta. Impresoj pri urbo kaj regiono en nord-orienta Brazilo kaj pri ties e-istoj. 45,00 gld.



**Kvin koloroj de Koreio.** Reĝ. Roman Dobrzyński. Varsovio, 1994. 30-minuta. Turisma prezento de nia ĵusa kongreslando. VHS-PAL: 60,00 gld. VHS-NTSC: 75,00 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en la Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

## KOMPLETIGO AL LA ABONTARIFO 1995 DE LA LIBROSERVO DE UEA

*Bulgara Esperantisto* 6 n-roj jare 25 gld.  
*Starto* (ĉeĥa) 6 n-roj jare 14 gld.



## ● Kalocsay: Eldonisto serĉata

Aperis la Kalocsay-libro kies prepariĝon ni menciis en februaro (p. 38): la 100-paĝa, hungarlingva *In memoriam Dr. Kalocsay Kálmán (1891-1976)*, eldonita de lia Amika Societo, enhavas utilan bibliografion de artikoloj pri Kalocsay, kun 84 eroj, kaj — en Esperanto — tripaĝan priskribon de lia postlasaĵo atendanta eldonon. Laŭ mallonga postnoto de la kompilinto, Ada Csiszár, “*In Memoriam* — laŭ strukturo — estas kvazaŭ skeleto de la presopreta, 800-paĝa *Omāge*, kiu entenas 3200 bibliografiajn indikojn, 240 fotojn, intervjuojn, plumnomojn, poemojn, recenzojn ktp.”

Kiu kompostos kaj presos *Omāge*? Kiu publikigos la postlasitajn Kalocsay-verkojn?

## ● Eldonisto serĉata 2

Per dekjara laboro kvin aŭstraj kaj germanaj e-istoj kompilis ĉ. 400-paĝan “parolturnaron”, kiu donas E-ekvivalentojn por ĉ. 20 mil germanaj esprimoj. Ĝis troviĝos eldonisto, la verko haveblas fotokopie, je la kosto-kovra prezo de 60 germanaj markoj, ĉe Hans kaj Kerstin Wiersch, Tilsiter Str. 39, DE-7063 Welzheim, Germanio. (*Esperanto aktuell*)

## ● Britio: Guĝarataj ampoemoj

La lukse arta, riĉe ilustrita volumo *Hriday Ganga* de la Londona poeto Ramesh Patel enhavas ampoemojn en la guĝarata kaj en 8 aliaj lingvoj, i.a. en Esperanto (tr. Naren Dholakia). La poemaron vendas Brita E-Centro (140 Holland Park Avenue, London, Britio, W11 4UF) kontraŭ 30 pundoj. (W. Green)

## Ĝustigo

En “Furoraĵoj de la kongresa Libro-servo” (nov., p. 197) estis erare preterlasita *Gramatiko de Esperanto* de Bak Ĝiŭan (trad. Kim U-Son; 15,90 gld.), vendita dum la Seula UK en 26 ekzempleroj. Tiel ĝi fakte okupas la *trian* lokon de la furorlisto.

## ● Japanio: Kleriĝo propralingve

En 1993 eldoniĝis ĉe Japana E-Instituto la unua sistema lernolibro pri la Esperanta gramatiko por japanlingvanoj, *Elementa Gramatiko de Esperanto* de HUZIMAKI Ken’iti. Aperis japane ankaŭ *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* de Marjorie Boulton, en elangligo de MIZUNO Yosiaki.



Martin Burkert kun sia arbo-amika bildlibro, kiu ĵus aperis ĉine-Esperante.




Foto de François Veuthey

## ● Eldonisto serĉata 3

Plurjara laboro kuŝas en *Maŝinelementoj*, 288-paĝa lernolibro por industriaj mezlernejoj, kiun kompilis Július Varinský kaj Ján Mužlay. Fondaĵo Maŝinelementoj (Aleš Bednařík, Lotyšská 8, SK-821 06 Bratislava, Slovakio) kolektas monon por almenaŭ fotokopii kaj, se eble, enkomputiligi la manuskripton.

## ● Abraham: Ne por tirkeŝto!

Lastatempe Georgo Abraham (Av. Alem 62, AR-2600 Venado Tuerto SF, Argentino), tradukinto de Ĥalil Ĝibrán kaj aŭtoro de neeldonita vortaro araba-E kaj E-araba, finverkis du lernolibrojn laŭ tradicia gramatika metodo: *El Esperanto explicado* por hispanlingvanoj, kaj *Kurso de Esperanto, la internacia lingvo* por arab-parolantoj.

## ● Esperanto por infanoj?

La libro *Looking at Language*, enkonduko al lingvo por britaj mezlernejoj, informas pri Esperanto sur 4 faktoriĉaj paĝoj, per tono de simpatio. Strangas tamen ke ĝi ĉerpas el *Esperanto por infanoj*, lernilo 60 jarojn aĝa. “Laŭ vi kial E-o ne sukcesis?” — demandas la libreto. Recenzanto Paul Gubbins respondas jene en *Esperanto Teacher*: “Eble ĉar tro da e-istoj vivas en la epoko de *Esperanto por infanoj*”.

## ● Kelklinie pri ...

Okaze de sia 90-jariĝo en 1993, *Espero Katolika*, la plej malnova daŭre aperanta E-revuo, reprenis (6-7/1994) sian 8-paĝan unuan numeron el 1903. ... Post dujara paŭzo reviviĝis la revuo *Liberecana Ligilo*, bulteno de SAT-frakcio (redaktas kaj presas Gilbert

Ledon, Rua Maria Aparecida Anacleto, 111-A, BR-04809-120 São Paulo SP, Brazilo). ... Włodzimierz Opoka (ul. Centralna 32, PL-31-586 Kraków, Pollando) transprenis de Saburō Yamazoe la redaktadon de *Medicina Internacia Revuo*, ekde junio 1994. ... *Eventoj* estas legebla komputile per Internet, ĉe pin@demos.su“ELENA”. ... *La Brita E-isto* festis sian 90-jariĝon per historia rerigardo (nov./dec. 1994). ... *La nova realismo* de Bruno Vogelmann aperis en la itala (*Il nuovo realismo*; Pisa: Edistudio, 1993) kaj en la albana (*Realizmi i ri*; Tirana: Albana E-Ligo). ... Post la japana-Esperanta dulingva originalo (19,80 gld. ĉe UEA), la bildlibro *La arbo ... kiu forkuris* de Martin Burkert (supre) aperis ĉe la tajvana eldonejo Big Tree en ĉina-Esperanta varianto. ★

# Reagoj



## Prononc-indikoj: jes, sed kiaj?

En sept. ("Vi trovos") menciĝas, denove, la propono aldoni al nomoj iujn prononc-indikojn. Mi tion tre aplaudus, ĉar mi tre ŝatas prononci nomojn ĝuste.

Sed ekzistas problemoj pri la maniero de indikado. Iuj sugestus uzi iun formon de "la" Internacia Fonetika Alfabeto. Tio tamen ne eblas. Unue: por povi iom taŭge redoni diverslandajn nomojn, oni bezonus uzi (kaj *lerni!*) dekojn da pliaj literoj. Due: eĉ IFA ne sendube indikas la prononcon; [ə] aŭ [r] en transskribo de la angla, franca, nederlanda, germana ktp ne indikas la saman sonon! Trie: ĉu iu kiu parolas lingvon kun unu a-sono, devas lerni distingi pli ol kvin diversajn a-sonojn [a, ɒ, ɔ, ɛ, ɐ...] por povi legi Esperanto-revuon? Kvare: kompostado de la revuo fariĝus tre komplika — apud mia nomo aperus ['vɔtər 'pɪlɔr].

Taŭgas *nur* la Esperanto-literoj, ĉar nur ĉe tiuj oni povas esperi ke ĉiu leganto havas imagon pri la prononco. Do, ĉu ni redonu per la "plej proksimaj" E-sonoj? Tiam ĉe

mia nomo indikiĝus [pɪlɦər]. Sed ankaŭ tiam vi misprononcus: ekzemple, /i/ kaj /e/ neniel similas al la ĝustaj sonoj. Fakte, same (mal)bona estas la prononco /pɪlɦər/: ankaŭ tiam /p/, /l/, /r/ estas proksimume ĝustaj, kaj /i/, /g/, /e/ tute ne... Sed nun ni faru unu, etan, paŝon pli: mi skribu kaj vi prononcu: Pilger'. Jen miraklo okazas. Ĉiu kiu kapablas prononci *pilko* kaj *geranio*, kapablas prononci *Pilger'*. Ĉar nun temas pri Esperanto-vorto, via prononco per viaj kutimaj E-sonoj fariĝas *tute ĝusta*, ĉar ne plu validas iu nederlanda prononco-normo, sed nur la Esperanta normo pri la ĝusta prononco!

Aldona avantaĝo de Pilger' estas la pluformado. Vi povos diri: *pilgeraĵo*, *pilgereca*, *gepilgeroj*, *pilgeridoj* ktp [kiel ni jam de longe faras en la CO — Red.].

Mi do ŝatus ke ĉiu aldonu al sia nomo Esperanto-version kiun ni *ĉiuj* povus tute ĝuste prononci. (La naci-lingvan prononcon de mia nomo mi instruos private.)

Wouter F. Pilger [*Pilger'*]  
(Nederlanda)

## Ne ĥimeran hibridon

Mi konsentas al la propono de prononc-indikoj, sed rigore laŭ la *Esperanta* fonologio. Povas ekzisti nur du legmanieroj por fremdaj vortoj: la etna prononco, por kies indikado servas la sola scienca internacia sistemo, Internacia Fonetika Alfabeto; kaj la Esperanta, kun nur 5 vokaloj kaj 23 konsonantoj — ne ĥimera hibrido inter la du. Kaj bonvolu montri la akcenton, se ĝi ne estas sur la antaŭ-lastaj silabo, per akuta supersigno.

YAMASAKI Seikō (Japanio)

## Nur unu el 16 inferoj

Iom malfrue mi aprobas la opinion de W. Bormann ("La faklingvo en Esperanto", jun. '93, p. 106), ke ni ne bezonas krei novajn vortojn kiam ni povas esprimi ion per jam ekzistantaj vortoj.

Tamen, rilate budhismon mi ne povas subteni tion, ĉar budhisman koncepton oni ne povas esprimi per vortoj kristanismaj. Krome, en PIV troviĝas tre malmulte da vortoj pri budhismo, ofte kun korektindaj difinoj. Ekz. *aviĉo* ne estas la tuta infero de japana budhismo, nur unu el la 16 grandaj inferoj. *Zeno* ne estas skolo, sed speco de meditado komuna al ĉiuj budhistoj.

Nun mi aranĝas terminaron pri budhismo, kvankam mi ne estas specialisto. Mi timas ke legantojn de PIV erarigas neĝustaj klarigoj.

NISI Yasuhiro (Japanio)

# JAM PLI OL 1000 VENDITAJ!



## Nova Esperanta Krestomatio

redaktita de William Auld

- klasikaj ekzercoj
- originalaj rakontoj
- ĉerpaĵoj el la mondliteraturo
- studoj "el vivo kaj sciencoj"
- prilingvaj artikoloj

kaj du unikaj antologietoj:

- La Esperanta Muzo (la Majstro, la lingvo, la Ideo, satiro)
- Internacia Liriko (specimena poemaro el 73 lingvoj)

Jubilea Kolekto n-ro 5. 509 p. 21 cm. Tole bindita kun kromkovrilo kaj paĝosigno. 57,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: triona rabato ekde tri ekzempleroj.

# Loke



## ● Aŭstrio: Malfermita muzeo-pordo

En la nacia festotago (26 okt.) la Vienaj muzeoj estas senpage viziteblaj. Ankaŭ Internacia Esperanto-Muzeo (ĉiam senkoste videbla) aranĝis “tagon de malfermita pordo”: mil personoj — aparte multaj ĉeĥoj, hungaroj kaj slovakoj — povis konatiĝi kun la realo de Esperanto.

Ekde novembro la muzeo havas novan duontempan kunlaborantinon: bibliotekistino Helga Farukuoye estas magistro pri esperantologio. (H. Mayer)

En du revuoj por aŭtomobilistoj aperis anonco de la asekura kompanio Wiener Städtische kun teksto en Esperanto (rolanta kiel ekzota lingvo), kiun



iniciatis la Viena esperantisto Reinhold Kammler. (L. Patek)

## ● Italio: Roma budo

La Roma E-Centro Luigi Minnaja, kunlabore kun aliaj e-istoj, aranĝis budon (dekstre) samnivelan kun la ceteraj ekspoziciantoj en “Espolingua Roma” (21-23 okt.). Miloj da vizitantoj povis konatiĝi kun la praktikaj uzoj de E-o. (R. Corsetti)

## ● Japanio:

### Ago-Tago en Jokohamo

Ŝajne la unuan fojon japanoj kunagis en la Ago-Tago: tri membroj de Jokohama E-Rondo vizitis 4 ĵurnalejojn kaj 2 radio-staciojn por paroli pri E-o kaj la monda lingvoproblemo. Ili esperas ke venontjare pli da lokaj kluboj en Japanio aliĝos al la iniciato. (Novaĵoj Tamtamas)

La pli ol 420 partoprenantoj de la 81-a Kongreso de Japanaj E-istoj (22-23 okt., Tokio) povis elekti inter 19 fakkunsidoj kaj 6 lingvaj kursoj, spekti teatraĵon pri Verda Majo, aŭskulti publikan dialogon inter UMESAO Tadao kaj TANAKA Katukiko (vd. dec., p. 214). (La Tamtamo)

# Fake



## ● Eldonado: Lerniloj de Heroldo

Heroldo de Esperanto, eldoninta lernolibrojn francan, hispanan, italan, kaj *Paŝoj al plena posedo* de W. Auld, lanĉos en somero 1995 lernilon 200-paĝan por germanlingvanoj, de d-ro Till Dahlenburg. Destinata por kursanoj kaj memlernantoj, ĝi baziĝas sur aktuala metodiko kaj informas pri praktikaj aplikoj de Esperanto. (Heroldo)

Ankaŭ por katalunoj prepariĝas lernolibro ĉe Heroldo: la aŭtoro, lingvo-instruisto Pedro Martin Burutxaga, uzas modernajn nacilingvajn modelojn. Oni esperas ke la verko pretos en 1996. (Kataluna E-isto)

## ● Instruado:

### Telegramoj el Eŭropo

La Laŭzana (Svislando) E-asocio pasigis la tutan someron kunproduktante la televidan E-instruan filmon *Saluton*, kiun elsendis ĉiusemajne en aŭtuno loka televido. (Brasikfolio) ★ Post anonco de Serbia E-Ligo en la

populara revuo *Treće oko* (“La tria okulo”), multaj legantoj el Serbio aliĝis al koresponda kurso laŭ la metodo de la fratoj Sekelj. (J. Nešić) ★ En septembro Atilio Orellana Rojas gvidis Cseh-kurson en la norvega Trondheim por 11 junuloj. ★ Samlande, Rolf Bergh atingis ke tri lokaj radio-stacioj enprogramigu inter novembro 1994 kaj marto 1995 la 18-lecionan E-kurson por komencantoj de Jan Rømmesmo, jam elsenditan lastjare de tri aliaj stacioj. (Norvega E-isto)

## ● Katolikismo:

### Propra domo en Romo

En junio (p. 117) ni raportis pri la intenco de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista aĉeti propran sidejon en Romo. Tio realiĝis la 18-an de oktobro, kaj IKUE esperas inaŭguri sian Centran Oficejon en aprilo. Laŭ reciproke utila aranĝo, la lokalo oficiale servos kiel loĝejo de la katolika aktivo Carlo Sarandrea kaj lia estonta edzino. IKUE (D-ro Antonio de Salvo, C.P. 4017, IT-00182 Rōma Appio, Italio) invitas daŭre kontribui al la fonduso “Doni domon al IKUE”, por konvene ekipi la sidejon. (Espero Katolika)

La 14-an de majo fondiĝis litova filio de IKUE. Temas pri la unua membro-organizo en eks-sovetia lando. (Litova Stelo)

## ● Centra Oficejo: Malferma Tago

La Centra Oficejo invitis la membrojn de la nova tutlanda asocio Esperanto Nederland (vd. nov., p. 198) al “Malferma Tago” la 26-an de novembro, sabate. Ĉirkaŭ 75 vizitantoj profitis la okazon por konatiĝi kun la Oficejo kaj ĝiaj laborantoj, babili ĉe kafo kaj kuko, spekti Esperantajn vidbendojn, kaj aĉeti varojn en la Libroservo sume je ĉ. 3500 guldenoj. Prepare al la Tamperea UK, ni kreis per afiŝoj, broŝuroj kaj montrofenestro finnan etoson, kiun multaj vizitantoj poste spertis aŭtente ĉe la samtempa bazaro de la proksima Finna Preĝejo. La CO esperas fondi per tio novan tradicion: venontjare ni invitos esperantistojn ankaŭ el najbaraj landoj.



### ● **Nederlando: Beletra E-poŝtkarto**

Inter la novjaraj bondezirkartoj eldonitaj de la Nederlanda Asocio de Tradukistoj unu prezentas Zamenhof, kun du verslinioj el *La infana raso* de Auld en Esperanto kaj la nederlanda. (W. Verloren van Themaat)

Esperantaj mesoj okazos en la katedralo de Speyer (Germanio) la 26-an de feb., 30-an de apr., 25-an de jun., 27-an de aŭg. kaj la 29-an de okt., ĉiam je 15h00. (A. Kronenberger)

### ● **Masaĝo: Saionji doktoriĝis**

En internacia scienca konferenco de pli ol 1100 personoj, "Tradicia kuracmetodo kaj nutraĵo" (Moskvo, 26-29 julio), subtenata de la rusa san-ministerio, SAIONJI Masayuki prelegis E-lingve pri la masaĝo Yumeiho. La konferenc-estro, akademiano Vladimir Kukes, transdonis al Saionji diplomon de honora doktoreco pri tradicia medicino kaj filozofio. (L. Titova)

### ● **Solidareco: Rapidhelpa reton!**

La 6-an de novembro inundo kaŭzis damaĝegojn ĉirkaŭ la nord-itala urbo Alessandria. Dank' al kunordigo de Itala E-ista Junularo (IEJ) kaj E-Centro de Torino, jam kvar tagojn poste alvenis surloken dekopa grupo da italaj kaj nederlandaj volontuloj por helpi forŝoveli la koton, repurigi loĝejojn kaj disdoni nutraĵojn. E-istoj ankaŭ kreis la bazojn por interŝanĝo de teknikaj inter Alessandria kaj la nederlanda Maastricht, kiu mem suferis inundon antaŭ unu jaro. Kuraĝigite pro tiu sperto, IEJ (p/a Francesco Amerio, Via Pagliani 5, IT-10126 Torino) volas krei internacian reton por simila rapidhelpo en kazoj de socia sufero. (*La Eta Gazeto*)

### ● **Regiono Mozo-Rejno: Senlime**

Organizado de la tradiciaj Trilandaj Renkontiĝoj estos nur unu el la agadformoj de asocio fondita en oktobro 1993, kiu donis al si definitivajn statuson kaj la nomon "Senlime" dum la lasta Trilanda Renkontiĝo (23 okt. 1994, Comblain-au-Pont, Belgio). Ĉi tiu nova teritoria unuiĝo ampleksas partojn de Belgio, Germanio kaj Nederlando, kaj celas "plifortigi la interpopolan interkompreniĝon helpe de E-o". Ĝenerala sekretario: Hans Wilsson, Houtstraat 60, NL-6343 BL Klimmen, Nederlando.



### ● **Labasthe: Rara diplomo**

Franca E-Instituto havas ekzamenojn je kvin niveloj; ĉe la plej alta, oni povas aljuĝi Diplomon pri Altaj Esperantaj Studoj. De post 1945 nur 17 personoj ricevis ĝin, i.a. Gaston Waringhien, Roger Bernard kaj Jean Thierry. En 1994 okazis nova sesio, kun unu kandidato. Gérard Labasthe, kiu eklernis Esperanton en 1990, ricevis la diplomon kun la mencio "Bona" kaj kun la malofta aldona atesto "Diplomita Tradukisto". (SAT-Amikaro)

### ● **Moínhos: Naturistoj neŭtrals**

Internacia Naturista Organizo Esperantista nuligis per estrara decido la eksmembrigon de Jesus Moínhos (Muínos) Pardavila, ĉar INOE "estas neŭtrala pri seksaj inklinoj". Kiel ni raportis (nov. 1993, p. 199), Moínhos estis eksigita pro samseksemo. Nun li dankas "al UEA, TEJO, Ligo de

Samseksamaj Geesperantistoj, kaj la multaj personoj kiuj ... esprimis solidarecon kaj apogon".

### ● **Raola: En Nova Mondo**

Orlando Raola González forlasis sian naskiĝlandon Kubo, siajn tieajn E-respondecojn, kaj la trian parton de sia nomo, "pro kialoj tute ne rilataj al Esperanto", kiel li skribis. La nova adreso de Orlando E. Raola estas: 121 Cortland Ave, San Francisco, CA 94110-5503, Usono (tel. +1/415/821-97-83; faks. 550-23-06; e-poŝto "outtwitter@aol.com"). Li esperas "daŭrigi la kontribuon al la loka kaj tutmonda E-movado".

### ● **Ziegler: Plej alta posteno**

La malnova UEA-membro Sven Ziegler, juĝisto ĉe la Supera Tribunalo en Kopenhago, estis nomita prezidanto de tiu ĉefa apelacia instanco ekde la 1-a de januaro 1995. (E. Svane)

*Preskaŭ ĉiu, kiu gravas en Esperantio abonas al*

# EVENTOJ

## Ĉu ankaŭ Vi?

*Petu senpagan provekzempleron:  
pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario*

**Léon DE BRUYNE** (1924-1994) mortis la 20-an de novembro en Belgio. Li estis fakdelegito pri turismo, kunfondinto de Belga E-ista Fervojista Asocio (1948) kaj de Monda Turismo (1970), unu el la plej vervaj agantoj sur tiuj du kampoj en la lastaj jardekoj. Dum la jaroj 1990-93 li vivis en Pollando.

**Jolante LESER** (1909-1994) mortis en Vieno la 7-an de oktobro. Rekonata aŭtorino german- kaj hungarlingva, ŝi e-istiĝis en 1947 kaj gajnis premion ĉe Belartaj Konkursoj en 1953 pro sia novelo *La limo* (aperinta ankaŭ en *Trezoro*). En 1991 eldoniĝis ŝia novelaro *La vivo estas pli forta*.

**Sergeo NOVIK-PJAJUN'** (1906-1994), plurlingva bjelorusa poeto, esperantisto ekde 1922, mortis la 26-an de aŭgusto en Minsk. Pro sia nacia kleriga laboro li estis internigita kaj de la polaj (1926-31) kaj de la sovetiaj (1944-58) aŭtoritatoj (10 jarojn en la severega koncentrejo Kolima). Li instruis Esperanton eĉ dum sia ekzilo, en Jakutio.

**Mikelo (Miĥail) T. POPOV** (1925-1994) forpasis la 20-an de oktobro. Esperantisto denaska, fizikisto kaj matematikisto, li publikigis multajn artikolojn ankaŭ en Esperanto. Li estis docento de AIS kaj direktoro de ties



**Mikelo Popov**

ukrainia sekcio. En la lastaj jaroj li profesoris ĉe la E-katedro de Internacia Instituto de Administro, pri kiu li verkis por *Esperanto* (nov. 1993, p. 186).

**Boris TOKAREV** (1927-1994) forpasis la 17-an de novembro en Moskvo. Esperantisto ekde 1958, dumviva membro de UEA kaj de Rusa Esperanto-Unuiĝo, li multe instruis, i.a. al blinduloj. Li estis ekde 1973 fakdelegito pri kemio kaj literaturo. En ĉi lasta kampo li konatiĝis sub la pseŭdonimo B. Tornado, publikigante originalajn kaj tradukitajn poemojn en multaj revuoj (i.a. *La Suda Stelo* kaj *Norda Prismo*), en la *Esperanta Antologio* kaj en la broŝuro *Versoj* (1991). Li tradukis i.a. *Eposo pri la militiro de Igorj* (1962) kaj *Versoj* de Rudaki (1991; vd. recenzon sur p. 14). Pri lia manuskripta heredaĵo (i.a. la romano-fabelo *Ardes* kaj la pli ol dekmil-versa epopeo *Vivo de Prometeo*) okupiĝas la Moskva eldonejo Impeto.

**Albinas VEBELIŪNAS** (1907-1994), esperantisto ekde 1925, organizinto de la unua postmilita E-rondo en Litovio (1957), fondinto (1966) kaj prezidanto de la Kaunasa E-klubo, forpasis la 12-an de januaro 1994 en Kaunas.

## OFICIALA INFORMILO

### SOCIETO ZAMENHOF 1994

Aŭstrio: Florence Côté-Cool. Nederlando: Maud Meijwes. Usono: Catherine L. Schulze.

### NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Aŭstralio: Ralph Harry.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Teresa M. Metherall.

AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: John B. Moore; Owen Loneragan; Tom Elliott.

### PATRONOJ DE TEJO 1995

Aŭstralio: Max Wearing. Belgio: Grégoire Maertens. Britio: A. Vincent-Jones. Germanio: Maria Vitalyos; Nora Caragea; Thomas Bormann. Italio: Ada Fighiera-Sikorska. Japanio: Hirotugu Hukumoto; Zyun'iti Sibayama; Koichi Kai. Nederlando: Hans ten Hagen.

### SOCIETO ZAMENHOF 1995

Aŭstralio: Jean A. Lehan; Keppel E. En-derby; Ralph Harry; Ruth McGrath; Teresa M. Metherall. Aŭstrio: Florence Côté-Cool. Belgio: Eliza Kehlet; Grégoire Maertens; Karel Van Steenberg; Marcel Delforge; Renée Herinckx-Ost. Britio: E.E. Mallett. Finnlando: Juho Pyykönen; Terttu Tyynelä. Francio: André Albault. Germanio: August Franke; Bruno Vogelmann; Horst Gruner; Jean Prager. Japanio: Kyotaro Deguti; Hirotugu Hukumoto; Kazuko Kikusima (Kri-

zantemo); Mituo Goto; Masayuki Saionji; Nobuyuki Syozi; Keiko Syozi. Nederlando: Huibert Oortwijn; Ingeborg M.J. Dijkhoff-Lenze; Maud Meijwes; Sija van Wijngaarden; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Tamiko Kaŭakami-Nielsen.

### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Germanio: Wieland Pusch. Japanio: Yosita Mine; Kunimaro Kaheki. Slovakio: Katarína Bodnárová.

### DONACOJ 1994 (gld.)

#### ĝis la 30-a de novembro

**Asocia Kapitalo:** Heredaĵo Nils Olsson 462,50. Sumo ĉi-jara 110 401,85.

**Fondaĵo Afriko:** Germanio: M.Bettmann 120,00. Hispanio: E. Collignon 146,31. Nederlando: J.P. Punt 100,00. Sumo ĉi-jara 7707,11.

**Fondaĵo Ameriko:** Monkolekto 79-a UK 375,80. Finnlando: S. Mynttinen 364,70. Hispanio: E. Collignon 146,31. Sumo ĉi-jara 2091,55.

**Fondaĵo Canuto:** Germanio: H. Bily 85,02; M. Gründler 77,19; O. Hub 16,78; A. Maassen 14,54; H. Otto 118,62; W. Pusch 84,00. Hispanio: E. Collignon 146,32. Japanio (por aziaj e-istoj): M. Asami 35,50; J. Brozovsky 35,41; H. Egawa 35,41; H. Gotou 70,82; Y. Hayakawa 35,41; K. Hayasi 35,41; M. Hiro-taka 35,41; H. Hukumoto 177,05; T. Huzi-sima 35,50; Y. Isii 70,82; M. Isino 177,05; K.

Kaheki 177,05; K. Katou 71,00; T. Kawai 35,41; T. Kobayasi 35,41; G. Konisi 177,05; T. Konisi 177,05; Y. Kuroyanagi 35,50; Y. Maeda 35,41; S. Mian 35,50. Y. Mizuno 35,41; T. Nakamiti 35,41; T. Nisikawa 35,41; T. Saitou 35,41; R. Samura 35,41; W. Schmid 35,41; Z. Sibayama 35,41; T. Sugano 106,23; T. Suzuki 70,82; K. Syozi 106,23; Y. Takase 35,41; M. Tahira 70,82; T. Taniguti 70,82; T. Ueda 35,41; M. Wada 70,82; S. Yamakawa 35,41; S. Yamamoto 70,82; S. Yamasaki 35,41. Luksemburgio: B. Moon 215,00. Nederlando: P. de Blaeij 20,94; W. Torenvlied 50,00; A.S.A. de Vries 20,00. Diversaj malgrandaj 12,36. Sumo ĉi-jara 19 432,38.

**Ĝenerala Kaso:** Aŭkcio 79-a UK 1504,54. Germanio: W. Murza 14,54; J. Radam 14,56. Nederlando: P.H.H. Parren 14,00. Diversaj malgrandaj 23,81. Sumo ĉi-jara 12 418,84.

**Konto Espero:** Anonima 100,00. Hispanio: E. Collignon 146,32. Sumo ĉi-jara 3829,45.

**Pasporta Servo:** Germanio: H. Sebastian 16,78. Usono: D.Holland 43,59. Sumo ĉi-jara 538,30.

**Triamonda Kongresa Fondaĵo:** Luksemburgio: B. Moon 215,00. Pollando: K. Babiarz 58,00. Diversaj malgrandaj 9,00. Sumo ĉi-jara 5852,92.

**Volontula Fondaĵo:** Britio: P.A. Danning 15,00. Finnlando: S. Mynttinen 270,00. Sumo ĉi-jara 810,19.

**Al ĉiuj tre koran dankon!**

**UEA**

● La domo de delegito Michael Scherm komplete forbrulis. Feliĉe, neniuj vundiĝis, sed pereis lia biblioteko kun 700 Esperantaj libroj kaj multaj E-gazetoj, neniigis ĉiuj liaj adresaroj. Ĝis konstruo de nova hejmo lia adreso estas: Staatliche Realschule Neu-Ulm, Albert-Schweitzer-Str. 12, DE-89231 Neu-Ulm, Germanio.

● Firmao INTERLAND vendas sian sliparon de 650 orient-eŭropaninoj serĉantaj okcidentan edzon. Starigu vian internacian svat-agentojn sur tiu fundamento! Ĉiu slipo (+ foto) vendiĝas je 20 USD, sed ni konsentas dividi prezon inter ĉiuj aĉetantoj: 2 pagos po 10 USD, 10 pagos po 2 USD. Aĉetantoj, anoncu vin al INTERLAND (25 bd. Sandeau, FR-75116 Paris).

● Uzitajn plastajn telefonkartojn el la tuta mondo kolektas Reinhardt Wiewe, R. Riemerschmid Allee 5, DE-81241 München, Germanio. Por ĉiu ricevita telefonkarto mi pagos po unu guldeno al la Fondaĵo Oficeja Ilaro.

● Sendu poŝtkartojn rilatajn al Esperanto por ekspozicio (1 marto - 16 apr., Svitavy) al: Orbis Pictus, Kvýtuše Veselá, Bezručova 24, CZ-56802 Svitavy, Ĉeĥio.

● Komerco kun Madagaskaro. Kvar Esperanto-aktivuloj en Madagaskaro — s-roj Raveloson, Rasolofo, Rabevazaha kaj Randrianarivelo — starigis komercan firmaon "Esperanto kaj Disvolviĝo", kun jura formo de kompanio kun limigita respondeco. Ĝi produktas malagasajn artaĵojn kaj eksportas tiujn, kolektas produktaĵojn kiel sekaj fazeoloj kaj eksportas ilin. Ĝi importas neprajn bezonaĵojn por la malagasa popolo kaj reprezentas alilandajn firmaojn en Madagaskaro.

Esperantistoj en la tuta mondo estas invitataj korespondi kun ĝi cele al komercado kaj investado. Provizora kontaktadreso ĉe Eugène Raveloson, Logement no. 387, Cité Analamahitsy, MG-101 Antananarivo, Malagasio/Madagaskaro.

## Anoncetoj

● Adresŝanĝo: S-ino Houkje Boersma-Hoekema havas novan adreson: Buorren 40, NL-9008 SW Reduzum, Nederlando; telefono: (05660) 24 11.

● Laste aperis: Adrian Donald Fettes, filo de Beverly Olds kaj Mark Fettes, fruis je dek unu tagoj por nomiĝi Ludoviko Lazaro (kaj tre kontentas pro tio).

● Finfine ni sukcesis! Salutas kiel geedzoj Betti Maul kaj Nenad Propadović.

### Fondaĵo Canuto


*Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!*

### FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

#### fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn.



Tibor Sekelj

## Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

*Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Alain Fournier

## La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.  
La sola verko de la aŭtoro,  
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 30,00 gld.

## La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno — kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo **KOSMOS**.

Petu senkoston provekzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio. ☎ +45 3834 6280 – Fakso +45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco

## Spuroj de la avo

Kontribuu al la rekonstruo de la naskiĝdomo de Zamenhof en Bjalistoko per aĉeto de la vidbendo *Spuroj de la avo* de Roman Dobrzyński. La 30-minuta filmo (1994, VHS-PAL) bildigas viziton de Louis C. Zaleski-Zamenhof al urboj en Pollando, Litovio kaj Bjelorusio, kie vivis lia avo. El la vendoprezio de 60 gld. sesono iras al la rekonstrua projekto.

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton, donas energion, natura kaj facile lernebla

## YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio de profesia terapiisto *Masayuki Saionji*.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.

Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko, CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

## Jen la plej

**KŜIAKTO** estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜIAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KŜIAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

### ABONTARIFO 1995

|           |              |          |              |             |              |
|-----------|--------------|----------|--------------|-------------|--------------|
| Aŭstralio | 30 dolaroj   | Francio  | 125 frankoj  | Nederlando  | 41 guldenoj  |
| Aŭstrio   | 245 ŝilingoj | Germanio | 37 markoj    | Norvegio    | 150 kronoj   |
| Belgio    | 765 frankoj  | Hispanio | 2100 pesetoj | Pollando    | 20 guldenoj  |
| Brazilo   | 20 guldenoj  | Israelo  | 32 guldenoj  | Portugaliao | 2500 eskudoj |
| Britio    | 15 pundoj    | Italio   | 30000 liroj  | Svedio      | 170 kronoj   |
| Danio     | 150 kronoj   | Japanio  | 2880 enoj    | Svislando   | 31 frankoj   |
| Finnlando | 115 markoj   | Kanado   | 29 dolaroj   | Usono       | 22 dolaroj   |

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj



**TEJO** lotumos valorajn premiojn inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!

# HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 75 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libreccenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, foto-filmo, "Mallonge", ktp.

Jarabono: 26,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

(55 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, IT-10078 Venaria Reale (TO), Italio

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska